

eLIBRO

Selma Lagerlöf

La mono de sinjoro Arne



INKO

Selma Lagerlöf

LA MONO DE SINJORO ARNE

El la sveda tradukis

Stellan Engholm

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-053-8

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

En la pastrodomo de Solberga

En la tempo, kiam la reĝo Fredriko la dua de Danlando reĝis la provincon Bohuslän, tiam loĝis en Marstrand malriĉa fiŝvendisto, kiu nomiĝis Torarin. Li estis malforta kaj senaplomba homo. Unu el liaj brakoj estis paralizita, kaj li taŭgis nek por fiŝado nek por remado. Li ne povis gajni sian vivtenon sur la maro kiel ĉiuj aliaj marbordanoj, sed li ĉirkaŭveturis kaj vendis salitan aŭ sekigitan fiŝon al homoj sur la firma tero. Li ne estis hejme multajn tagojn en la jaro, li ĉiam veturis de vilaĝo al vilaĝo kun sia fiŝoŝarĝo.

En la krepuskiĝo iun februaran tagon Torarin veturis sur la vojo, kiu de Kungshäll kondukas al la paroĥo Solberga. La vojo estis soleca kaj senhoma, sed Torarin ne bezonis silenti pro tio. Sur la ŝarĝo li havis apud si plenvaloran amikon, kun kiu li povis paroli. Estis malgranda, nigra hundo kun densa hararo, kiun Torarin nomis Grim. Plej ofte ĝi kuŝis senmova kun la kapo malsuprenpremita inter la kruroj kaj nur palpebrumis al ĉio, kion diris la mastro. Sed kiam ĝi aŭdis ion, kio ne plaĉis al ĝi, tiam ĝi ekstaris sur la ŝarĝo, streĉis sian buŝon aeren kaj hurlis pli terure ol lupoj.

”Nun mi rakontos al vi, Grin, mia hundo” diris Torarin, ”ke mi hodiaŭ aŭdis grandajn novaĵojn. Kaj en Kungshäll kaj en Kareby oni diris al mi, ke la maro kovriĝis per glacio. Estis bona kaj kvieta vetero dum kelka tempo, tion plej bone scias vi, kiu veturis ĉiujn tagojn, kaj laŭdire la maro estas gla-

cikovrita ne nur en golfoj kaj markoloj sed eĉ malproksime sur Kattagatt. Nun ekzistas neniu vojo inter la insuletoj por boatoj kaj ŝipoj, estas nur forta, firma glacio ĉie, tiel ke oni povas veturi per ĉevalo kaj sledo ĝis Marstrand kaj la Pater-nosterŝeroj.”

Ĉion tion aŭdis la hundo, kaj ŝajne ĝi ne malplaĉis al ĝi. Ĝi kuŝis senmova kaj nur palpebrumis al Torarin.

”Ne tre multe da fiŝo restas de nia ŝarĝo,” diris Torarin kvazaŭ persvade. ”Ĉu ni ĉe la plej proksima vojdisiĝo flankenveturu okcidenten al la maro, kion vi opinias? Ni preterveturos la preĝejon de Solberga kaj pluen al Ödsmålskil, poste ne restas multe pli ol kvin kvaronmejoj ĝis Marstrand, mi kredas. Estus granda afero povi veni hejmen unu fojon uzante nek boaton nek pramon.”

Ili veturis trans la longan erikejon de Kareby, kaj kvankam estis kvieta vetero la tutan tagon, malvarma aerfluo glitis trans la erikejon kaj faris la veturon malagraba.

”Povas ŝajni malvire tiel veturi hejmen meze en la plej bona labortempo”, diris Torarin kaj svingis la brakojn pro la malvarmo. ”Sed ni tamen estis survoje dom multaj semajnoj, vi kaj mi, kaj meritas sidi hejme dum kelkaj tagoj, por ke la frosto fordegelu el la korpo.”

Ĉar la hundo ankoraŭ kuŝis trankvile, Torarin ŝajnis firmiĝi en sia opinio, kaj daŭrigis en pli gaja tono:

”Jen patrino sidis sola en la domo dum multaj tagoj. Certe ŝi sopiras renkonti nin. Kaj en Marstrand estas grandioza vivo nun en la vintro. Stratoj kaj stratetoj, Grim, estas plenaj de fremdaj fiŝistoj kaj komercistoj. En la fiŝistaj bordaj magazenoj estas dancado ĉiuvespere. Kaj kiom da biero fluas en la trinkejo! Tion vi neniel povas kompreni!”

Dirante tion Torarin klinis sin al la hundo por rigardi, ĉu ĝi aŭskultas, kion li diras al ĝi. Sed ĉar la hundo kuŝis tute maldorma kaj faris neniun signon de malŝato, Torarin flankenveturis sur la unuan vojon, kiu kondukis okcidenten al la maro. Li klakvapis la ĉevalon per la kondukrimeno kaj igis ĝin iri rapide.

”Ĉar ni preterveturos la pastrodomon de Solberga,” Torarin diris, ”mi tamen eniros tien kaj demandas, ĉu estas vere, ke la glacio estas sekura ĝis Marstrand. Tie ili tamen devas koni tiun aferon.”

Torarin diris tion per mallaŭta voĉo sen pripensi, ĉu la hundo aŭskultas aŭ ne. Sed la vortoj apenaŭ estis diritaj, kiam la hundo ekstaris sur la ŝarĝo kaj eligis teruran hurlon.

La ĉevalo faris salton alflanke, kaj ankaŭ Torarin ektime-tis kaj rigardis malantaŭen por vidi, ĉu lupoj venas post li. Sed kiam li trovis, ke estas Grim, kiu hurlas, li provis trankviligi ĝin.

”Kara,” li diris al ĝi, ”ĉu ni ne tiomfoje enveturis sur la korton de Solberga! Mi ja ne scias, ĉu sinjoro Arne havas informojn pri la glacio, sed pri tio mi estas certa, ke li donos al ni bonan vespermanĝon, antaŭ ol ni komencos nian marveturon.”

Sed liaj vortoj ne povis trankviligi la hundon. Ĝi streĉis sian buŝon supren kaj hurlis pli kaj pli terure

Tiam Torarin preskaŭ ektimis. Estis nun preskaŭ malhele, sed Torarin tamen povis vidi la preĝejon de Solberga kaj la vastan ebenon ĉirkaŭ ĝi, kiu estis ŝirmata de larĝaj arbaraj altaĵoj sur la interna flanko kaj marflanke de rondaj, senarabaj rokmontetoj. Kiam li antaŭenveturis tute sola sur la vasta, blanka ebena, ŝajnis al li, ke li estas sensignifa kaj malgran-

da rampuleto, kaj el la malhelaj arbaroj kaj la solecaj montetoj proksimiĝas grandaj monstroj kaj sorĉestaĵoj ĉiuspecaj, kiuj kuraĝas iri sur senarbaran terenon, post kiam malheliĝis. Kaj sur la tuta ebena la malriĉa Torarin estis la sola, kiun ili povis ataki.

Sed samtempe li provis silentigi la hundon. "Kara, kion vi havas kontraŭ sinjoro Arne? Li estas la plej riĉa homo en la lando. Li estas de alta deveno, kaj se li ne estus pastro, li estus fariĝinta granda estro."

Sed li ne sukcesis silentigi la hundon per tio. Tiam elĉerpiĝis la pacienco de Torarin, kaj li prenis la hundon je la nukhaŭto kaj ĵetis ĝin de la ŝarĝo.

La hundo ne sekvis lin, kiam li pluveturis, sed staris senmova sur la vojo kaj hurlis, ĝis Torarin enveturis tra malhela pordega volbo kaj venis sur la korton de la pastra domo, kiu estis ĉirkaŭita de kvar longaj vicoj de malaltaj lignaj domoj.

II.

En la pastrodomo de Solberga sidis la pastro, sinjoro Arne, kaj vespermanĝis en la rondo de siaj domanoj. Ĉeestis neniu fremdulo krom Torarin. La pastro estis maljuna, grizhara homo, sed tamen li estis ankoraŭ forta kaj altstatura. Lia edzino sidis apud li. Ŝin la jaroj malbone traktis. Ŝiaj kapo kaj manoj tremis, kaj ŝi estis preskaŭ surda. Sur la alia flanko de sinjoro Arne sidis la helppastro. Li estis juna kaj pala kaj aspektis ĉagrenita, kvazaŭ li ne povus porti ĉiun saĝon, kiun li kolektis dum la studjaro en Wittenberg.

Tiuj tri sidis ĉe la alinterna ekstremo de la tablo, kvazaŭ iel apartigite. Ĉe la longflankoj sidis Torarin kaj poste la servistoj. Ili ankaŭ estis maljunaj homoj. Estis tri servistoj, ili havis kalvajn kapojn, la dorsoj estis kurbaj, kaj la okuloj palpebrumis kaj larmetis. La servistinoj estis nur du. Ili estis iom pli junaj kaj viglaj ol la servistoj, sed tamen ili ŝajnis kadukaj kaj plenaj de malsanetoj de maljuneco.

Ĉe la alia ekstremo de la tablo sidis du infanoj. Unu estis nepino de sinjoro Arne, ŝi estis nur dekkvarjara. Ŝi estis helhara kaj havis delikatan korpon, la vizaĝo ne estis preta ankoraŭ, sed ŝajnis, ke ŝi povos fariĝi bela. Alia malgranda knabino sidis apud ŝi. Ŝi estis malriĉa orfino, kiu ĉiam vivis en la pastra domo. Tiuj du sidis proksime unu al la alia kaj ŝajne granda amikeco kunligis ilin.

Ĉiuj manĝis dum profunda silento. Torarin rigardis de unu al alia, sed neniu havis emon paroli dum la manĝo. Ĉiuj maljunaj pensis: "Estas granda beno ricevi manĝaĵon kaj ne suferi aŭ malsati, kiel ni multfoje faris en nia vivo. Dum ni manĝas ni devas pensi nur pri la boneco de Dio kaj danki lin pro ĝi."

Ĉar Torarin ne povis paroli kun iu, liaj rigardoj migris tien kaj reen en la ĉambro. Ili flugis de la granda forno, kiu estis masonita en multaj ŝtupoj ĉe la enirejo, al la alta baldakenlito en la plej malproksima angulo de la ĉambro. La rigardoj iris de la murfiksaj benkoj, kiuj sekvis la murojn ĉirkaŭ la ĉambro, supren al la truo en la tegmento, tra kiu la fumo eliris kaj la vintra malvarmo enfluis.

Kiam la fiŝvendisto Torarin, kiu loĝis en la plej malgranda kaj malriĉa dometo en la insularo, rigardis ĉion tion li pensis: "Se mi estus potenculo kiel sinjoro Arne, mi ne estus

kontenta loĝi en malnovega domo kun nur unu ĉambro. Mi konstruus al mi domon kun altaj frontonoj kaj multaj ĉambroj, kiel faras urbestroj kaj la anoj de la urba konsilantaro en Marstrand.”

Sed plej ofte Torarin sendis siajn rigardojn al granda kverka kesto, kiu staris ĉe la piedo de la baldakena lito. Li tiel ofte rigardis ĝin, ĉar li sciis, ke sinjoro Arne en ĝi konservas sian arĝentan monon, kaj li aŭdis, ke la moneroj estas tiel multaj, ke ili plenigas la keston ĝis la rando. Kaj Torarin, kiu estis tiel malriĉa, ke li preskaŭ neniam havis arĝentan moneron en sia poŝo, diris al si mem: ”Mi tamen ne volus havi tiujn mone-rojn. Oni diras, ke sinjoro Arne prenis ilin el la grandaj monaĥejoj, kiuj troviĝis en la lando en la malnova tempo, kaj ke la maljunaj monaĥoj antaŭdiris, ke tiu mono kaŭzos mal-feliĉon al li.”

Ĝuste kiam Torarin sidis kun tiuj pensoj, li vidis la maljunan mastrinon meti la manon al la orelo por pli bone aŭdi. Poste ŝi turnis sin al sinjoro Arne kaj demandis lin: ”Kial ili akriĝas tranĉilojn en Branhög?”

La silento en la ĉambro estis tiel granda, ke ĉiuj ekskuiĝis kaj timigite ekrigardis, kiam la maljuna virino demandis tion. Kiam ili vidis, ke ŝi sidas senmova kaj aŭskultas al io, ili tenis siajn kulerojn senbrue kaj penis aŭdi.

Dum momento estis tute mortsilente en la ĉambro, sed dume la maljunulino pli kaj pli maltrankviliĝis. Ŝi metis la manon sur la brakon de sinjoro Arne kaj demandis lin: ”Mi ne scias, kial ili en tiu ĉi vespero akriĝas tiel longajn tranĉilojn en Branhög?”

Torarin vidis, ke sinjoro Arne karesas ŝian manon por

trankviligi ŝin. Sed li ne respondis al ŝi, sed manĝis trankvile kiel antaŭe.

La maljuna virino daŭrigis sian aŭskultadon. Larmoj venis en ŝiajn okulojn pro teruro, kaj ŝiaj manoj kaj kapo tremis pli kaj pli forte.

Tiam la du knabinoj, kiuj sidis ĉe la ekstremo de la tablo, komencis plori pro timo.

”Ĉu vi ne aŭdas la skrapadon kaj fajladon?” demandis la maljunulino. ”Ĉu vi ne aŭdas la sibladon kaj grincadon?”

Sinjoro Arne sidis senmove kaj karesis la manon de sia edzino. Tiel longe, ke li silentis, neniu alia kuraĝis diri ion.

Sed ĉiuj kredis, ke la maljuna mastrino aŭdas ion, kio estas terura kaj malfeliĉiga. Ĉiuj sentis, ke la sango frostiĝas en iliaj vejnoj. Neniu ĉe la tablo metis manĝaĵon en la buŝon krom la maljuna sinjoro Arne mem.

Ili pensis pri tio, ke la maljuna mastrino estas tiu, kiu dum multaj jaroj zorgis pri la hejmo. Ŝi ĉiam restis hejme kaj kun prudento kaj bonkoreco gardis infanojn kaj servistojn, bienon kaj brutaron, tiel ke ĉio bonkreskis. Nun ŝi estis eluzita kaj mortmaljuna, sed tamen estis kredeble, ke ŝi pli frue ol iu alia rimarkus, se iu danĝero minacus la domon.

La maljuna virino pli kaj pli timis. Ŝi kunfaldis siajn manojn kaj komencis senhelpe plori tiel forte, ke grandaj larmoj falis sur la ŝrumpintajn vangojn. ”Ĉu vi tute ne atentis pri tio, Arne Arneson, ke mi tiel timas?” ŝi plendis.

Sinjoro Arne nun klinis sin al ŝi kaj diris: ”Mi ne scias, kio timigas vin.”

”Mi timas la longajn tranĉilojn, kiujn ili akriĝas en Branehög.” ŝi diris. ”Kiel vi povas aŭdi, ke ili akriĝas tranĉilojn en Branehög?” diris sinjoro Arne kaj ridetis. ”Tiu bieno kuŝas ja

kvaronmejlon de tie ĉi. Prenu ree vian kuleron, kaj ni finu nian vespermanĝon!”

La maljunulino provis trankviligi sian timegon. Ŝi prenis sian kuleron kaj movis ĝin al la laktopelveto, sed tiam la mano tiel tremis, ke ĉiuj aŭdis, kiel la kulero klakpuŝis kontraŭ la randon. Ŝi tuj remetis ĝin sur la tablon. ”Kiel mi povus manĝi?” ŝi diris. ”Ĉu mi ne aŭdas, kiel grincadas? Ĉu mi ne aŭdas, kiel fajlas?”

En la sama momento sinjoro Arne forŝovis la laktopelveton kaj kunfaldis siajn manojn. Ĉiuj aliaj faris same, kaj la helppastro komencis diri la tablopreĝon.

Kiam tiu estis finita, sinjoro Arne rigardis ĉiujn, kiuj sidis ĉe la tablo, kaj kiam li rimarkis, ke ili estas palaj kaj timas, tiam li ekkoleris.

Li komencis paroli kun ili pri la tempo, kiam li ĵus venis al Bohuslän por prediki la luteran kredon. Tiam li kaj liaj servistoj devis forkuri antaŭ la papanoj kiel pelataj bestoj. ”Ĉu ni ne vidis malamikojn embuski, kiam ni iris al la domo de Dio? Ĉu ni ne estis forpelataj el la pastrodomo kaj devis forkuri al la arbaro kiel eksterleĝuloj? Ĉu decas al ni tute maltrankviliĝi kaj perdi nian kuraĝon pro malbona antaŭsigno?”

Kiam sinjoro Arne parolis, li aspektis kiel batalulo, kaj la aliaj ekhavis novan kuraĝon aŭdante lin.

”Estas ja vere,” ili pensis. ”Dio ŝirmis sinjoron Arne en la plej grandaj danĝeroj. Li tenas sian manon super li. Li ne permesas, ke lia servisto pereos.”

III.

Tuj kiam Torarin elveturis sur la vojon, lia hundo Grim venis kontraŭ lin kaj saltis sur la ŝarĝon. Kiam Torarin vidis, ke la hundo atendas ekster la pastrodomo, li ree maltrankviliĝis. "Kara, kial vi staras tie ĉi en la pordego la tutan vesperon? Kial vi ne iras en la ĉambron kaj ricevas vespermanĝon?" li diris al la hundo. "Ĉu io malbona povas atendi sinjoron Arne? Povas esti, ke mi vidis lin la lastan fojon. Sed ankaŭ tia batalulo kiel li tamen devas iam morti. Li ja estas preskaŭ naŭdekjara." Li direktis la ĉevalon sur vojon, kiu preter la bieno Branhög kondukas al Ödsmålskil.

Kiam li alvenis al Branhög, li vidis, ke sledoj staras sur la korto, kaj ke lumstrioj elglitas tra la fermitaj pordetoj en la muro.

Tiam Torarin diris al Grim: "Tie ĉi homoj ankoraŭ maldormas. Mi volas enveturi kaj demandi, ĉu oni hodiaŭ vespere akriĝis tranĉilojn en tiu ĉi domo."

Li enveturis sur la korton, sed malfermante la pordon de la domo li vidis, ke estas festeno tie. Sur la benkoj laŭ la muroj sidis maljunuloj trinkantaj bieron, kaj sur la planko iris la gejunuloj ludante kaj kantante.

Torarin tuj vidis, ke neniu tie ĉi intencas ordigi siajn armilojn por sangaj faroj. Li volis fermi la pordon kaj foriri, sed la mastro postvenis lin. Li petis Torarin, ke li restu kiam li nun jam alvenis, kaj kuntiris lin en la ĉambron.

Sufiĉe longe Torarin sidis tie kun agrablaj sentoj, parolante kun la kamparanoj. Ili estis tre gajaj, kaj Torarin tre ĝojis, ke li povis forpeli ĉiujn malhelajn pensojn.

Sed Torarin ne estis la sola, kiu venis malfrue al la festo en

tiu vespero. Multe pli poste viro kaj virino trapaŝis la pordon. Ili estis malriĉe vestitaj, kaj ili senkuraĝe haltis en la angulo inter la pordo kaj la forno. La mastro tuj iris al la du gastoj. Li prenis ilin, unu per ĉiu mano, kaj kondukis ilin al la interno de la ĉambro. Poste li diris al la aliaj: "Ĉu ne estas vere, kiel oni diras, ke tiuj, kiuj havas la plej mallongan vojon, plej malfrue alvenas? Tiuj estas miaj plej proksimaj najbaroj. Ne ekzistas pli da terposedantoj sur Branehög ol ili kaj mi."

"Pli bone diru, ke vi estas la sola!" diris la viro. "Vi ne povas nomi min terposedanto. Mi estas nur malriĉa karbigisto, al kiu vi permesis konstrui domon sur via tero."

La viro eksidis apud Torarin, kaj ili komencis interparoli. La veninto rakontis al Torarin, kial li venis tiel malfrue al la festeno. Estis pro tio, ke al ilia kabano venis gastoj, kiujn ili ne kuraĝis forlasi. Estis tri tanistaj submajstroj, kiuj estis ĉe ili la tutan tagon. Kiam ili alvenis matene, ili estis elĉerpitaj kaj malsanaj. Ili diris, ke ili erariris en la arbaro dum tuta semajno. Sed manĝinte kaj dorminte ili baldaŭ reakiris forton, kaj vespere ili demandis, kiu domo estas la plej granda kaj riĉa en tiu ĉi regiono. Tien ili volis iri por serĉi laboron. La edzino respondis al ili, ke la pastra domo, kie loĝas sinjoro Arne, estas la plej eminenta domo. Tiam ili tuj eliris longajn tranĉilojn el siaj dorsosakoj kaj komencis akriigi ilin. Ili okupis sin pri tio sufiĉe longe, kaj dume ili aspektis tiel sovaĝaj, ke la karbigisto kaj lia edzino ne kuraĝis iri de la hejmo. "Mi ankoraŭ vidas ilin antaŭ mi, kiel ili sidas kaj grinças per siaj tranĉiloj," diris la viro. "Ili aspektis teruraj, ili havis grandajn barbojn, kiujn ili ne tondis aŭ ordigis dum multaj tagoj, kaj ili estis vestitaj per vilaj feljako, kiuj estis disŝiritaj kaj kot-

plenaj. Mi kredis, ke estas tri monstroj, kiuj venis en nian ĉambron. Mi ekĝojis, kiam ili fine foriris.”

Kiam Torarin aŭdis tion, li rakontis al la karbigisto pri tio, kion li travivis en la pastrodomo.

”Tamen do estis vere, ke ili hodiaŭ vespere akriĝis tranĉilojn en Branehög,” diris Torarin kaj ridis. Li estis multe trinkinta pro tio, ke li venis al la domo tiel malgaja kaj sentopremita. Li devis laŭpove provi konsoli sin mem. ”Nun mi ree ĝojas,” li diris, ”kiam mi eksciis, ke la antaŭsigno, kiun la pastroedzino aŭdis, estis nur kelkaj tanistoj, kiuj pretiĝis siajn ilojn.”

IV.

Longe post noktomezo du viroj eliris el la ĉambro sur Branehög por meti jungilaron sur sian ĉevalon kaj veturi hejmen.

Kiam ili venis sur la korton, ili vidis brulegon flagri supren al la ĉielo en la nordo. Ili tiam tuj rapidis ree en la ĉambron kaj vokis: ”Ekstaru! Ekstaru! La pastrodomo de Solberga estas brulanta!”

Estis multe da homoj ĉe la festeno, kaj tiu, kiu havis ĉevalon, saltis sur ĝian dorson kaj rapidis al la pastrodomo, sed preskaŭ same rapide alvenis tiuj, kiuj devis kuri tien per propraj, viglaj kruroj.

Kiam la homoj venis al la pastrodomo, ili vidis neniun homon, sed ĉiuj ŝajnis dormi, kvankam la fajrego flagris alten al la ĉielo. Tamen neniu el la domoj brulis, sed granda amaso da branĉetoj kaj pajlo kaj ligno, kiu estis kunĵetita apud la muro de la malnova pastrodomo. Ĝi ne estis brulinta longe.

La flamoj ankoraŭ nur nigrigis la bonajn trunkojn de la muro kaj degeligis la neĝon sur la tegmento. Nun ili tamen ekmordis la pajlon de la tegmento.

Ĉiuj tuj komprenis, ke estas brulkrimo. Ili komencis demandi sin, ĉu sinjoro Arne kaj liaj domanoj vere dormas, aŭ ĉu malfeliĉo okazis al ili. Sed antaŭ ol la savantoj eniris la brulantan domon, ili per longaj stangoj forŝovis de la muro la brulantan ŝtiparon kaj grimpis sur la tegmenton kaj forŝiris la pajlon, kiu jam komencis fumi kaj preskaŭ ekbrulis.

Poste kelkaj viroj iris al la pordo por eniri kaj veki sinjoron Arne, sed kiam la unua el ili venis al la sojlo, li paŝis flanken kaj donis lokon al tiu, kiu venis post li. Tiu faris paŝon antaŭen, sed kiam li etendis la manon al la anso, tiam li flankeniris kaj donis lokon al tiuj, kiuj staris post li.

Ŝajnis al ili terure malfermi tiun pordon, ĉar larĝa sangofluo elglitis sub la sojlo, kaj la anso estis makulita de sango.

Tiam la pordo malfermiĝis antaŭ ili, kaj la helppastro de sinjoro Arne elvenis. Li ŝanceliĝe iris antaŭen al la viroj, li havis profundan vundon sur la kapo, kaj li estis plena de sango. Li staris rekta dum momento kaj levis sian manon por peti silenton. Poste li diris per stertora voĉo:

”En tiu ĉi nokto sinjoro Arne kaj ĉiuj liaj domanoj estis murditaj de tri viroj, kiuj grimpis suben tra la truo en la tegmento kaj estis vestitaj per vilaj feloj. Ili saltis sur nin kiel sovaĝaj bestoj kaj mortigis nin.” Pli li ne povis. Li falis antaŭ la piedojn de la viroj kaj estis senviva.

Nun homoj iris en la domon kaj trovis ĉion tiel, kiel diris la helppastro.

La granda kverka kesto, en kiu sinjoro Arne konservis sian

monon, estis for, kaj la ĉevalo de sinjoro Arne estis prenita el la stalo kaj lia sledo el la veturilejo.

Sledspuroj kondukis de la domo trans la herbejojn de la bieno kaj ĝis la maro, kaj dudek viroj rapidis antaŭen por kapti la murdintojn. Sed la virinoj iris prizorgi la mortintojn kaj portis ilin el la sangomakulita ĉambro eksteren sur la puran neĝon.

Tiam ne estis tie ĉiuj el la domanoj de sinjoro Arne, unu mankis. Estis la malriĉa knabino, kiun sinjoro Arne prenis en sian domon. Estiĝis granda miro, ĉu ŝi eble sukcesis forkuri, aŭ ĉu la rabistoj kunprenis ŝin.

Sed kiam ili zorge traserĉis la tutan ĉambron, ili trovis ŝin tie, kie ŝi kaŝis sin inter la granda forno kaj la muro. Ŝi kaŝis sin tie dum la batalo kaj estis tute nedifektita, sed ŝi estis tiel premita de timo, ke ŝi povis nek rakonti nek respondi.

Sur la varfoj

La malriĉan knabinon, kiu estis savita el la sangelveso, Torarin kunprenis al Marstrand. Li tiel ekkompatis ŝin, ke li proponis al ŝi loĝi en lia mallarĝa kabano kaj dividi la panon kun li kaj lia patrino.

”Tio estas la sola, kion mi povas fari por sinjoro Arne,” pensis Torarin, ”kiel rekompenco por tio, ke li tiomfoje aĉetis mian fiŝon kaj gastigis min ĉe sia tablo.”

”Kiel ajn malaltranga kaj malriĉa mi estas,” pensis Torarin, ”estas tamen pli bone por la knabino, ke ŝi akompanu min al la urbo, ol ke ŝi restu tie ĉi inter la kamparanoj. En Marstrand estas multaj riĉaj urbanoj kaj la juna knabino eble povos servi ĉe unu el ili kaj trovos bonan vivtenon.”

Veninte en la urbon la knabino la unuajn tagojn sidis plorante de mateno ĝis vespero. Ŝi ĝemis pro sinjoro Arne kaj liaj domanoj kaj plendis, ke ŝi perdis ĉiujn, kiuj estis proksimaj al ŝi. Plej ŝi plendis pro sia nutrofratino kaj diris, ke ŝi deziras, ke ŝi ne estu kaŝinta sin, ĉar tiam ŝi estus povinta sekvi ŝin en la morton.

La patrino de Turarin diris nenion pri tio tiel longe, ke la filo restis hejme. Sed kiam li ree foriris sur siajn veturojn, ŝi iun matenon diris al la knabino:

”Mi ne estas tiel riĉa, Elseto, ke mi povas doni al vi nutraĵon kaj vestojn, por ke vi povu sidi kun la manoj sur la sino

kaj gardi vian doloron. Venu kun mi al la varfoj kaj lernu prepari fiŝojn.”

Tiam Elseto iris kun ŝi al la varfoj kaj staris la tutan tagon inter la aliaj fiŝlaboristinoj kaj laboris.

Sed plej multaj virinoj sur la varfoj estis junaj kaj gajaj. Ili komencis paroli kun Elseto kaj demandis ŝin, kial ŝi estas tiel malgaja kaj silenta.

Tiam Elseto komencis rakonti al ili, kian aventuron ŝi ĉeestis antaŭ nur tri tagoj. Ŝi parolis pri la tri rabistoj, kiuj eniris en la domon tra la tegmenta truo kaj murdis ĉiujn, kiuj estis proksimaj al ŝi. Kiam Elseto rakontis tion, nigra ombro falis sur la tablono, kie ŝi laboris. Kaj kiam ŝi levis sian rigardon, staris antaŭ ŝi tri junaj altrangaj sinjoroj, kiuj portis larĝajn ĉapelojn kun longaj plumoj kaj velurajn vestojn kun grandaj pufoj, broditaj per silko kaj oro. Unu el ili ŝajnis esti la plej altranga. Li estis tre pala, la barbo estis razita, kaj la okuloj kuŝis profunde. Ŝajnis, ke li ĵus estis malsana. Sed cetere li ŝajnis esti gaja kaj kuraĝa kavaliro, kiu ĉirkaŭiras sur la sunplena varfoj por doni okazon al la homoj rigardi liajn belajn vestojn kaj lian belan vizaĝon.

Elseto ĉesigis kaj sian laboron kaj sian rakonton. Ŝi staris kun malfermita buŝo kaj grandaj okuloj kaj rigardis lin. Kaj li ridetis al ŝi.

”Ni ne venis por timigi vin, fraŭlino,” li diris, ”sed ni petas vin, ke vi permesu ankaŭ al ni aŭskulti vian rakonton.”

La malriĉa Elseto! Dum sia tuta vivo ŝi ne vidis tian viron. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi ne povas paroli antaŭ li. Ŝi nur silentis kaj rigardis malsupren sur sian laboron.

Tiam la fremdulo ankoraŭfoje komencis: ”Ne lasu timigi vin, fraŭlino! Ni estas skotoj, kiuj servis sub la reĝo Johano

de Svedlando dum plenaj dek jaroj, sed nun ni elserviĝis kaj intencas veturi hejmen. Ni venis al Marstrand por serĉi ŝipon al Skotlando, sed kiam ni alvenis, ĉiuj markoloj kaj fjordoj estis kovritaj per glacio, kaj jen ni devas resti ĉi tie kaj atendi. Ni havas neniun okupon, kaj tial ni iras sencele sur la varfoj por renkonti homojn. Ni tre ĝojus, fraŭlino, se vi permesus al ni aŭskulti vian rakonton.” Elseto komprenis, ke li parolas tiel longe, por ke ŝi povu regajni sian trankvilon. Fine ŝi pensis: ”Vi tamen montru, ke vi ne estas tro simpla por paroli kun alta sinjoro, Elseto. Vi estas fraŭlino de bona deveno kaj ne fiŝista knabino.”

”Mi parolis nur pri la granda sangelverŝo en la pastrodomo de Solberga,” diris Elseto. ”Estas tiel multaj, kiuj povas rakonti pri tio.”

”Jes,” diris la fremdulo, ”sed mi ne sciis antaŭe, ke iu el la domanoj de sinjoro Arne savis sian vivon.”

Tiam Elseto ankoraŭfoje rakontis pri la sovaĝa traktado de la rabistoj. Ŝi rakontis, kiel la maljunaj servistoj kolektis sin ĉirkaŭ sinjoro Arne por defendi lin, kaj kiel sinjoro Arne mem ekkaptis sian glavon de sur la muro kaj paŝis al la rabistoj, sed tiuj venkis ilin ĉiujn. Kaj la maljuna edzino de la pastro levis la glavon de sia edzo de la planko kaj iris kontraŭ la rabistojn, sed ŝin ili nur priridis kaj faligis per lignoŝtipo. Kaj ĉiuj aliaj virinoj rampe kaŝis sin sur la forno, sed kiam la viroj estis mortintaj, la murdantoj venis kaj eltiris kaj mortigis ilin. ”La lasta, kiun ili mortigis,” diris Elseto, ”estis mia kara nutrofratino. Ŝi tiel humile petis por sia vivo, kaj du el ili volis lasi ŝin vivi, sed la tria diris, ke ĉiuj devas morti, kaj li puŝis sian tranĉilon en ŝian koron.” Tiel longe, ke Elseto parolis pri murdo kaj sango, la tri viroj staris senmovaj an-

taŭ ŝi. Ili ne interŝanĝis eĉ unu rigardon, sed iliaj oreloj streĉiĝis pro la aŭskulto, kaj iliaj okuloj fajreris, kaj kelkfoje iliaj lipoj disiĝis tiel, ke la dentaroj ekbrilis.

La okuloj de Elseto estis plenaj de larmoj, eĉ ne unu fojon ŝi levis la rigardon, dum ŝi parolis. Ŝi ne vidis, ke la viro antaŭ ŝi havas okulojn kaj dentojn kiel lupoj. Nur finparolinte ŝi viŝis siajn okulojn kaj suprenrigardis al li.

Sed kiam li renkontis la rigardon de Elseto, lia vizago tuj ŝanĝiĝis.

”Ĉar vi tiel bone vidis la murdintojn, fraŭlino”, li diris, ”vi verŝajne tuj rekonus ilin, se vi ilin renkontus?”

”Mi vidis ilin nur en la lumo de la brulantaj ŝtupoj, kiujn ili eltiris el la forno por fari lumon al si dum la murdado,” diris Elseto, ”sed Dio estas potenca, kaj certe mi rekonus ilin. Kaj mi preĝas al Dio ĉiutage, ke mi renkontu ilin.”

”Kion vi volas diri per tio, fraŭlino?” la fremdulo demandis. ”Ĉu ne estas vere, ke la murdemaj migrantoj estas mortintaj?”

”Jes, mi bone scias tion,” Elseto diris. ”La kamparanoj, kiuj persekutis ilin, sekvis iliajn spurojn de la pastrodomo ĝis truo en la glacio. Ĝis tie ili sur la glata glacio vidis spurojn de sledoj, de ĉevalhufoj kaj de homoj, kiuj portis malmolajn, fero-garnitajn ŝuojn. Sed de la truo neniu spuro kondukis plu trans la glacieron, kaj tial la kamparanoj kredis, ke ili ĉiuj estas mortintaj.”

”Ĉu vi ne kredas, Elseto, ke ili mortis?” la fremdulo demandis.

”Jes, mi ja kredas, ke ili dronis,” Elseto diris, ”kaj tamen mi preĝas ĉiutage al Dio, ke ili estu sin savintaj. Mi diras al Dio

tiel: "Estu tiel, ke ili veturigis nur la ĉevalon kaj la sledon en la truon, sed ke ili savis sin mem."

"Kial vi volas tion, Elseto?" demandis la fremdulo.

La delikata knabino Elseto ĵetis sian kapon malantaŭen, kaj ŝiaj okuloj brilis. "Mi volas ja, ke ili vivu, por ke mi trovu ilin kaj kaptu ilin. Mi volas, ke ili vivu, por ke mi povu ŝiri la koron el ilia brusto. Mi volas, ke ili vivu, por ke mi vidu iliajn korpojn dishakitaj en kvar partojn kaj fiksitaj sur la radoj."*

"Kiel vi havus fortojn por ĉio tio?" la fremdulo diris. "Vi estas ja nur tiel malforta, malgranda fraŭlino."

"Se ili vivus," Elseto diris, "mi certe venigus punon sur iliajn kapojn. Prefere mi mortus ol lasus ilin forkuri. Ili estas fortaj kaj potencaj, tion mi scias, sed de mi ili ne savus sin."

Tiam la fremdulo ridetis al ŝi, sed Elseto frapis per la piedo.

"Se ili vivus, tion mi bone memorus, ke ili forprenis de mi mian hejmon, tiel ke mi nun estas nur malriĉa knabino, kiu devas stari sur malvarma varfo kaj senintestigi fiŝojn. Mi memorus, ke ili mortigis ĉiujn, kiuj estis proksimaj al mi, kaj plej multe mi memorus lin, kiu tiris mian nutrofratinon de la forno kaj mortigis ŝin, kiu estis tiel bonkora al mi."

Sed kiam la malgranda kaj malforta fraŭlino montris tian koleron, la tri skotaj soldatoj komencis ridi. Ili estis tiel ridemaj, ke ili foriris, por ke Elseto ne ofendiĝu pro ili. Ili transiris la havenan lokon kaj laŭiris mallarĝan strateton, kiu kondukis al la vendoplaco. Sed longe post ilia malapero, Elseto aŭdis, ke ili ridas per plena gorĝo, moke kaj akre.

**) Malnovtempa ekzekuto; oni dishakis la korpon en kvar partojn kaj metis tiujn sur kvar kuŝantajn radojn.*

La elsenditino

Ok tagojn post sia morto sinjoro Arne estis enterigata en la preĝejo de Solberga, kaj la saman tagon estis juĝa esploro pri la murdo ĉe la juĝa renkontejo sur Branehög.

Sed sinjoro Arne estis bone konata homo en Bohuslän, kaj en lia enteriga tago tiom da homoj kunvenis kaj el la interna lando kaj el la insularo, ke estis, kvazaŭ kiam soldataro kolektas sin ĉirkaŭ sia estro. Kaj sur la kampoj inter la preĝejo de Solberga kaj Branehög paŝis tiom da homoj, ke en la vesperiĝo ne restis eĉ cololarĝa strio da neĝo, kiu ne estis surpaŝita de homoj. Sed malfrue en la vespero, kiam ĉiuj tiuj jam foriris, Torarin fiŝvendisto venis veturante sur la vojo de Branehög supren al Solberga.

Torarin parolis kun multaj homoj en la daŭro de la tago. Ree kaj ree li estis rakontinta pri la morto de sinjoro Arne. Li ankaŭ estis bone regalita ĉe la juĝa kunvenejo kaj devis kune kun fremdlokaj vojaĝantoj malplenigi multajn bierkruĉojn. Torarin sentis sin malvigla kaj peza. Li estis ekkuŝinta sur la ŝarĝo. Li estis ĉagrenita pro tio, ke sinjoro Arne estis for, kaj kiam li venis proksime al la pastrodomo, eĉ pli pezaj pensoj komencis turmenti lin. "Grim, mia hundo," li diris, "se mi estus kredinta la antaŭsignon pri la tranĉiloj, mi estus povinta deturni la tutan malfeliĉon. Mi ofte pensas pri tio, Grim, mia hundo. Mi sentas angoron, kvazaŭ mi mem kunhelpis forigi sinjoron Arne el la mondo. Memoru, kion mi nun di-

ras, ke la proksiman fojon, kiam mi aŭdos ion tian, mi kredos kaj agos laŭ tio!”

Dum Torarin kun duonfermitaj okuloj kvazaŭ dormis sur la ŝarĝo, lia ĉevalo iris laŭ propra plaĉo, kaj kiam ĝi venis al la pastrodomo de Solberga, ĝi laŭ malnova kutimo eniris sur la korton kaj al la stalpordo. Torarin tute ne sciis pri tio. Nur kiam la ĉevalo haltis, li ekstaris kaj ĉirkaŭrigardis. Teruro trakturis lin, kiam li rimarkis, ke li troviĝas sur la korto antaŭ domo, kie tiom da homoj estis murditaj antaŭ nur unu semajno.

Li tuj volis preni la kondukrimenojn. Li volis turni la ĉevalon kaj ree elveturi sur la vojon, sed en la sama momento iu batetis lian ŝultron kaj li rigardis post sin. Tiam staris apud li la maljuna Olof ĉevalisto, kiu servis en la pastrodomo tiel longe, kiel Torarin povis memori.

”Ĉu vi tiel urĝe devas forlasi la domon tiun ĉi nokton, Torarin?” la servisto diris. ”Prefere vi venu en la ĉambron. Sinjoro Arne atendas vin.” Mil pensoj venis en la kapon de Torarin. Li ne sciis, ĉu li songas aŭ maldormas. La ĉevaliston Olof, kiun li nun vidis sana kaj vivanta antaŭ si, li antaŭ unu semajno vidis kuŝi mortinta apud la aliaj kun granda vundo sur la kolo.

Torarin pli firme prenis la kondukrimenon. Ŝajnis al li, ke estus plej bone foriri kiel eble plej rapide. Sed la mano de Olof ĉevalisto ankoraŭ kuŝis sur lia ŝultro, kaj la maljunulo daŭrigis trudi lin.

Torarin cerbumis tien kaj reen por trovi pretekston. ”Ne estis mia intenco veni kaj ĝeni sinjoron Arne tiel malfrue en la vespero,” li diris. ”La ĉevalo flankeniris tien ĉi sen mia scio.

Mi nun pluveturos por havigi al mi tranoktejon. Se sinjoro Arne volas renkonti min, mi ja povos reveni morgaŭ.”

En tiu momento Torarin klinis sin antaŭen kaj ekbatis la ĉevalon per la kondukrimeno por igi lin ekmoviĝi.

Sed en la sama momento la servisto staris apud la kapo de la ĉevalo, kaptis la bridon kaj devigis ĝin resti senmova. ”Ne estu obstina, Torarin,” la servisto diris. ”Sinjoro Arne ankoraŭ ne ekkuŝis, li sidas kaj atendas vin. Kaj vi ja bone scias, ke vi povas ricevi same bonan tranoktejon tie ĉi kiel aliloke en la paroĥo.”

Tiam Torarin volis respondi, ke li ne povas kontentiĝi loĝi en sentegmenta domo. Sed antaŭ ol li diris ion, li jetis rigardon supren al la loĝodomo. Tiam li vidis la malnovan loĝdomon stari same netuŝita kaj granda kiel antaŭ la brulo. Tamen Torarin ankoraŭ en la mateno vidis la nudajn ĉevronojn elstari en la aeron.

Li vidis kaj vidis kaj frotis siajn okulojn, sed tamen la pastrodomo staris sendifekta kun pajlo kaj neĝo sur la tegmento. Li vidis fumon kaj fajrerojn flirti supren tra la tegmenta truo. Kaj li vidis lumon filtriĝi sur la neĝon tra la nebone fermitaj fenestrolukoj.

Tiu, kiu vaste veturas sur malvarma vojo, ne konas pli bonan vidaĵon ol la lumon, kiu elŝtelas sin el varma ĉambro. Sed je tiu vido Torarin sentis eĉ pli grandan timon ol antaŭe. Li vipis la ĉevalon, ke ĝi levis sin kaj stampfis. Sed ĝi ne sukcesis iri eĉ unu paŝon de la stalpordo.

”Vi kuniru internen, Torarin,” diris la ĉevalisto. ”Mi kredas, ke vi ne havos ion por pripenti en tiu ĉi afero.”

Nun Torarin ekmemoris, kion li survoje promesis al si mem. Li, kiu ĵus staris sur la ŝarĝo kaj fervorege svingis la

kondukrimenon, tuj fariĝis malobstina kiel ŝafido. ”Jen, Olof ĉevalisto, jen mi nun estas,” li diris kaj saltis de la ŝarĝo. ”Estas vere, ke mi ne volas havi ion por pripenti en tiu ĉi afero. Konduku min nun al sinjoro Arne!”

Sed kiam Torarin iris trans la korton al la domo, li faris la plej pezajn paŝojn en sia tuta vivo.

Kiam la pordo malfermiĝis, li fermis la okulojn por ne rigardi en la ĉambron. Sed li provis kolekti kuraĝon pensante pri sinjoro Arne. ”Li donis al vi multfoje bonan manĝon. Li aĉetis vian fiŝon, ankaŭ kiam lia provizejo estis plena. Li ĉiam estis bonkora al vi dum la vivo, kaj certe li ankaŭ ne volas fari malbonon al vi post la morto. Eble li volas peti servon de vi. Vi ne forgesu, Torarin, ke oni devas montri dankemon ankaŭ al la mortintoj.”

Torarin malfermis la okulojn kaj rigardis en la ĉambron. Tiam li vidis la grandan ĉambron tute tia, kian li antaŭe vidis ĝin. Li rekonis la altan masonitan fornon kaj la teksitajn murtapiŝojn, kiuj pendis sur la muroj. Sed li multfoje rigardis de muro al muro kaj de planko al tegmento, antaŭ ol li kuraĝis rigardi al la tablo kaj la benko, kie kutime sinjoro Arne sidis.

Fine li rigardis ankaŭ tien, kaj tiam li vidis sinjoron Arne mem sidi plenviva meze antaŭ la tablo kun la edzino kaj la helppastro ĉe la flankoj, kiel li vidis lin antaŭ ok tagoj. Ŝajne li ĵus finis sian manĝon, li estis forŝovinta la pelveton, kaj la kulero kuŝis antaŭ li sur la tablo. Ĉiuj maljunaj servistoj kaj servistinoj sidis ĉe la tablo, sed nur unu el la junaj knabinoj.

Longe Torarin staris senmova ĉe la pordo kaj rigardis tiujn, kiuj sidis ĉe la tablo. Ili ĉiuj aspektis korpremitaj kaj ĉagre-

nitaj, kaj ankaŭ sinjoro Arne sidis kun pezaj pensoj kiel la aliaj kaj apogis la kapon sur la mano.

Fine Torarin vidis, ke sinjoro Arne levas la kapon.

”Ĉu vi enkondukas iun fremdulon en la ĉambron, Olof ĉevalisto?”

”Jes,” la servisto respondis, ”estas Torarin fiŝvendisto, kiu hodiaŭ ĉeestis la juĝan kunvenon sur Branehög.”

Ŝajnis, ke sinjoro Arne ekaspektis pli gaja, kaj Torarin aŭdis lin diri: ”Do venu antaŭen, Torarin, kaj donu al ni novaĵojn de la juĝokunveno! Jen mi sidis kaj atendis vin la duonan nokton.”

Ĉio tio sonis tiel reale kaj nature, ke Torarin sentis sin pli kaj pli sentima. Li tute kuraĝe iris trans la plankon al sinjoro Arne. Li demandis sin, ĉu ne estis malbona sonĝo, ke sinjoro Arne estis murdita, kaj ĉu la vero ne estas, ke li vivas.

Sed dum Torarin iris trans la plankon, li laŭ malnova kutimo sendis rigardon al la baldakena lito, kie la granda monkesto ĉiam staris. Sed la ferogarnita kesto ne estis plu sur sia loko, kaj kiam Torarin vidis tion, teruro ree trakuris lin. ”Nun Torarin diru al ni, kio estis la rezulto de la juĝokunveno hodiaŭ,” diris sinjoro Arne.

Torarin provis fari laŭordone kaj rakontis pri la juĝokunveno kaj la esploro, sed li povis regi nek sian langon nek siajn lipojn sed parolis malbone kaj balbute.

Sinjoro Arne ankaŭ tuj interrompis lin: ”Diru al mi nur la plej gravan, Torarin! Ĉu oni trovis kaj punis niajn murdintojn?”

”Ne, sinjoro Arne,” Torarin tiam respondis kun kolektita kuraĝo. ”Viaj murdintoj kuŝas sur la fundo de Hakefjordo. Kiamaniere iu povos venĝi al ili?”

Kiam Torarin donis tiun respondon, sinjoro Arne ekflamis de sia malnova humoro, kaj li forte frapis la tablon per la mano. "Kion vi diras, Torarin? Ĉu la provincestro en Bohus ne estis tie ĉi kun leĝistoj kaj skribistoj kaj faris juĝokunvenon, kaj ĉu neniu povis diri al li, kie li povos trovi miajn murdintojn?"

"Ne, sinjoro Arne," Torarin respondis, "tion neniu inter la vivantoj povas diri al li."

Dum momento sinjoro Arne sidis kun kuntiritaj brovoj kaj rigardis malgaje antaŭ sin. Poste li ankoraŭfoje turnis sin al Torarin.

"Mi scias, ke vi estas sindona al mi, Torarin. Ĉu vi do povas diri al mi, kiel mi povu trovi venĝon al miaj murdintoj?"

"Mi bone povas kompreni, sinjoro Arne," Torarin tiam diris, ke vi deziras venĝi vin al tiuj, kiuj tiel senkompate prenis vian vivon. Sed neniu inter ni, kiuj vivas sur la tero, povas helpi vin pri tio."

Ricevinte tiun respondon sinjoro Arne komencis malgaje cerbumi.

Estis longa silento. Post iom da tempo Torarin kuraĝis vortigi deziron.

"Mi nun plenumis vian deziron, sinjoro Arne, kaj diris, kio estis la rezulto de la juĝokunveno. Ĉu vi ankoraŭ volas demandi al mi pri io, aŭ ĉu vi permesas al mi foriri?"

"Vi ne foriru, Torarin," diris sinjoro Arne, "antaŭ ol vi ankoraŭfoje diros al mi, ĉu ne iu el la vivantoj povas venĝi nin."

"Se ĉiuj viroj en Bohuslän kaj Norvegio kunvenus por venĝi al viaj murdintoj, ili ne estus kapablaj trovi ilin," Torarin diris.

Tiam sinjoro Arne diris:

”Ĉar la vivantoj ne povas helpi nin, ni devas helpi nin mem.”

Kaj poste li komencis per laŭta voĉo diri Patronian, ne norvege sed latine, kiel estis kutimo diri ĝin en la lando antaŭ lia tempo. Kaj je ĉiu vorto de la preĝo, kiun li elparolis, li per la fingro montris al unu el tiuj, kiuj sidis kun li ĉe la tablo. Tiamaniere li montris al ili multfoje, ĝis li venis al amen. Sed kiam li diris tiun vorton, li etendis la fingron al la juna knabino, kiu estis lia nepino.

La juna knabino tuj ekstaris de la benko, kaj sinjoro Arne diris al ŝi: ”Vi scias, kion vi devas fari.”

Tiam la juna knabino plendis dirante: ”Ne sendu min tiucele. Estas tro malfacila komisio por tiel malforta knabino kiel mi.”

”Vere vi devas iri,” diris sinjoro Arne. ”Estas ĝuste, ke vi iru, ĉar vi havas plej multe por venĝi. De neniu oni forrabis tiom da vivojaroj kiom de vi, kiu estas la plej juna inter ni.”

”Certe mi ne postulas venĝon al iu homo,” diris la knabino.

”Vi tuj iru,” sinjoro Arne diris. ”Kaj vi ne estas sola. Vi scias, ke inter la vivantoj estas du, kiuj sidis kun ni ĉe la tablo tie ĉi antaŭ ok tagoj.”

Sed kiam Torarin aŭdis sinjoron Arne diri tion, li kredis kompreni, ke sinjoro Arne elektas lin por batali kontraŭ malbonfarantoj kaj murdistoj, kaj li elkriis:

”Je la dia kompatado mi petas vin, sinjoro Arne ———”

En la sama momento ŝajnis al Torarin, ke kaj sinjoro Arne kaj la pastrodomo malaperis en nebulon kaj li mem malsupreniĝis profunden, kvazaŭ ii estus falinta de sveniga alto, kaj je tio li perdis la konscion.

Kiam li ree vekigis, la matenhelo jam montris sin. Li tiam vidis, ke li kuŝas sur la tero apud la pastrodomo de Solberga. La ĉevalo staris apud li kun la ŝarĝo, kaj Grim bojis kaj hurlis super li.

”Ĉio estis nur sonĝo,” Torarin diris, ”nun mi komprenas tion. La domo estas senhoma kaj detruita. Mi vidis nek sinjoron Arne nek iun alian. Sed la sonĝo tiel timigis min, ke mi falis de la ŝarĝo.”

En la lunlumo

Dekkvar tagojn post la morto de sinjoro Arne venis kel kaj noktoj kun forta, klara lunlumo. Kaj iun vesperon Torarin veturis en la lunlumo. Li haltigis la ĉevalon fojon post fojo, kvazaŭ estus malfacile al li trovi la vojon. Li tamen ne veturis en erariga arbaro sed sur io, kio ŝajnis vasta kaj senarbara ebena, sur kiu levis sin multaj ŝtonplenaj montetoj.

La tuta regiono estis kovrita per blanka, brila neĝo. Ĝi falis en bona vetero, ĉie samkvante, ĝi ne kuŝis en amasoj aŭ kirlaĵoj. Tiel vaste, kiel okulo povis vidi, estis nur tiu sama kaj plata ebena kaj la samaj ŝtonplenaj montetoj.

“Grim, mia hundo,” Torarin diris, “se ni nun vidas tion la unuan fojon, ni certe kredus, ke ni traveturas grandan erikejon. Sed certe ni mirus pri tio, ke la tero estas tiel ebena kaj la vojo sen ŝtonoj aŭ kavoj. Kia regiono estas, ni dirus, kie estas nek drenfosoj nek bariloj, kaj de kio dependas, ke nek herbo nek arbusto elstaras el la neĝo? Kaj kial ni ne vidas riveretojn aŭ fluetojn, kiuj ĉiam tiras siajn nigrajn sulkojn tra la blankaj kampoj ankaŭ en plej forta malvarmo?”

Torarin trovis grandan plezuron en tiuj pensoj, kaj ankaŭ al Grim ili plaĉis. Ĝi ne movis sin de sia loko sur la ŝarĝo sed kuŝis trankvile kaj palpebrumis.

Sed ĝuste kiam Torarin finis sian parolon, li preterveturis altan stangon, sur kiu branĉofasko estis fiksita.

“Se ni estus fremdaj tie ĉi, Grim, mia hundo,” Torarin di-

ris, "tiam ni certe demandus nin, kia erikejo estas tio ĉi, kie oni starigas la samajn signojn, kiujn ni uzas sur la maro. 'Ĉu tio vere povas esti la maro?' ni fine dirus. Sed tio certe ŝajnus al ni tute nebla. Tio ĉi, kio kuŝas tiel firme kaj trankvile, ĉu ĝi povus esti nur akvo? Kaj ĉiuj tiuj rokmontetoj, kiuj nun kuŝas tiel forte kunligitaj, ĉu ili estus nur insuletoj kaj ŝeroj apartigitaj de ŝaŭmantaj ondoj? Ne, certe ni ne povus kredi, ke io tia estus ebla, Grim, mia hundo."

Torarin ridis, kaj Grim ĉiam kuŝis senmova kaj trankvila. Torarin veturis plu, ĝis li ĉirkaŭvenis altan rokmonteton. Tiam li ekkriis, kvazaŭ li estus vidinta ion rimarkindan. Li ŝajnis grandan surprizon, faligis la kondukrimenojn kaj kunfrapis la manojn.

"Grim, mia hundo, kiu ne volis kredi, ke tio ĉi estas la maro! Jen vi tamen vidas, kio ĝi estas. Ekstaru, kaj vi vidos, ke granda ŝipo kuŝas antaŭ ni! Vi ne volis rekoni la marsignojn, sed pri tio ĉi vi ne povas erari. Nun vi tamen ne povas nei, ke ni veturas sur la maro."

Torarin haltis ankoraŭ dum momento kaj rigardis grandan ŝipon, kiu kuŝis frostfiksita de la glacio. Ĝi aspektis tute erarveturinta, kuŝante kun la ebena, glata neĝokampo ĉirkaŭ si.

Sed kiam Torarin vidis, ke fumeto eliras el la ŝipanara kajuto, li alveturis kaj vokis la ŝipestron por ekscii, ĉu li deziras aĉeti de lia fiŝo. Nur kelkaj moruoj restis sur la fundo de la veturilo, ĉar en la daŭro de la tago li ĉirkaŭveturis al ĉiuj ŝipoj, kiuj estis frostfiksitaj en la insularo, kaj disvendis sian provizon.

Surŝipe sidis la ŝipestro kun siaj viroj kaj ĝismorte enuis.

Ili aĉetis fiŝon de la vendisto, ne pro bezono sed ĉar ili deziris paroli kun iu.

Kiam ili venis sur la glacieron al Torarin, tiu ŝajnis senkomprenan mienon.

Li komencis paroli kun ili pri la vetero. "En tempo memorebla ne estis tiel bela vetero kiel en tiu ĉi jaro," Torarin diris. "Dum preskaŭ tri semajnoj ni havis kvietan veteron kaj fortan malvarmon. Tiam belveteron ni malofte havas en la insularo."

Sed la ŝipestro, kies galeaso estis plensargita per haringobareloj, kaj kiu estis frostfiksita en golfo apud Marstrand, ĝuste kiam li volis direkti ĝin al la maro, li rigardis Torarin severe kaj diris:

"Ĉu vi nomas tion bela vetero?"

"Kiel mi do nomu ĝin?" Torarin diris. Li aspektis senkomprena kiel infano. "La ĉielo estas klara, kvietaj kaj blua, kaj la nokto estas same bela kiel la tago. Neniam antaŭe mi povis ĉirkaŭveturi sur la glacio semajnon post semajno. La maro malofte estas glacikovrita tie ĉi, kaj se okazis tiel en iu jaro, tiam past kelkaj tagoj venis ŝtormo kaj disŝiris la glacieron."

La ŝipestro staris malhela kaj malgaja; li ne respondis ion al la babilo de Torarin. Tiam Torarin komencis demandi, kial li ne iras al Marstrand. "Estas ja nur unuhora iro trans la glacio," Torarin diris. Al tio li ankaŭ ne respondis. Torarin komprenis, ke la homo ne volas forlasi la galeason eĉ por momento, pro timo ne esti surloke, kiam la glacio disŝiriĝos. "Malofte mi vidis iun kun la okuloj tion sopirmalsanaj," pensis Torarin.

Sed la ŝipestro, kiu tagon post tago estis enfermita inter la

insuletoj kaj ne povis hisi la velojn kaj veturi maren, dum la tempo havis multajn pensojn, kaj li diris al Torarin:

”Vi, kiu ĉie ĉirkaŭveturas kaj ĉion aŭdas, kio okazas, ĉu vi scias, kial Dio en tiu ĉi jaro tiel longe fermas la vojojn al la maro kaj tenas nin ĉiujn en mallibereco?”

Kiam li diris tion, Torarin ĉesis rideti, sed li ŝajnis ne-komprenon kaj diris: ”Nun mi ne komprenas, kion vi volas diri.”

”Nu,” diris la ŝipestro, ”mi iam kuŝis en la haveno de Bergen dum tuta monato, kaj ĉiujn tagojn blovis kontraŭvento, tiel ke neniuj ŝipoj povis eliri. Sed sur unu el la ŝipoj, kiuj kuŝis enfermitaj en la haveno, estis viro, kiu estis ŝtelinta en preĝejoj, kaj li estus savinta sin, se la ŝtormo ne estus blovinta. Nun oni havis tempon eltrovi, kie li estas, kaj kiam li estis subordigita, tiam tuj fariĝis bela vetero kaj bona vento. Ĉu vi nun komprenas, kion mi volas diri, kiam mi demandas, ĉu vi scias, kial Dio tenas la pordojn al la maro fermitaj?”

Dum iom da tempo Torarin staris silenta. Ŝajnis, ke li ŝatas respondi per seriozaj vortoj. Sed li forpuŝis tion kaj diris: ”Vi fariĝas pezpensa, kiam vi sidas enfermita tie ĉi inter la insuletoj. Kial vi ne iras al Marstrand? Mi diras al vi, ke tie estas gaja vivo. Tie estas centoj da fremduloj. Ili ne havas alian okupon ol dancadon kaj trinkadon.”

”Kial povas esti tiom da ĝojo tie?” la ŝipestro demandis.

”Ho,” Torarin diris, ”tie estas maristoj, kies ŝipoj estas frostfiksitaj same kiel la via. Tie estas multe da fiŝistoj, kiuj ĝuste finis sian haringokaptadon, kiam la glacio malhelpis ilin iri hejmen. Kaj estas centoj da skotaj dungosoldatoj, kiuj elserviĝis kaj nun kuŝas tie ĉi kaj atendas okazon por veturi

hejmen al Skotlando. Ĉu vi kredas, ke tiuj iras kun klinitaj kapoj kaj forgesas fari al si gajajn tagojn?"

"Jes, povas esti, ke tiuj povas amuziĝi, sed mi plej ŝatas atendi tie ĉi," la ŝipestro diris.

Torarin sendis al li rapidan rigardon. La ŝipestro estis alta, malgrasa viro. Liaj okuloj estis helaj kaj akvoklaraj kun melankolia rigardo. "Tiun viron mi ne povas gajigi kaj ankaŭ neniu alia," Torarin pensis.

Ankoraŭfoje la ŝipestro komencis paroli kun li seninstige. "Tiuj skotoj," li diris, "ĉu ili estas bonaj homoj?"

"Ĉu eble estas vi, kiu veturigos ilin al Skotlando?" Torarin diris.

"Jes," diris la ŝipestro, "mi havas ŝarĝon al Edinburgo, kaj unu el ili ĵus estis tie ĉi kaj priparolis kun mi, ke mi kunprenu ilin. Sed mi ne ŝatas veli kun tiaj sovaĝuloj surŝipe, kaj mi petis tempon por pripensi. Ĉu vi kredas, ke mi povas riski akcepti ilin?"

"Mi aŭdis pri ili nur tion, ke ili estas kuraĝaj homoj. Certe vi povas akcepti ilin."

Sed en la sama momento, kiam Torarin diris tion, lia hundo ekstaris sur la ŝarĝo, streĉis la buŝon aeren kaj komencis hurli.

Torarin tuj interrompis sian laŭdon al la skotoj.

"Kio nun estas, Grim, mia hundo?" li diris. "Ĉu ŝajnas al vi, ke mi tro longe staras sur la glacio kaj forbabilas la tempon?"

Li pretigis sin por pluveturo. "Nu, fartu do bone tie ĉi ĉemare!" li diris.

Torarin veturis al Marstrand tra la mallarĝa akvokolo inter Trifoli-insulo kaj Bovin-insulo. Kiam li estis tiom proksi-

me, ke li povis vidi Marstrand, li rimarkis, ke li ne estas sola sur la glacio.

En la klara lunlumo li vidis altan viron kun fiera teniĝo iri trans la neĝon. Li vidis, ke li portas plumornamitan ĉapelon kaj riĉe broditan veston kun larĝaj pufoj.

”Jen,” Torarin diris al si mem, ”tie iras sir Archie, la estro de la skotoj, kiu hodiaŭ vespere estis sur la galeaso por mendi transveturon al Skotlando.”

Torarin estis tiel proksime al la viro, ke li atingis lian longan ombron, kiu glitis antaŭen post li. Lia ĉevalo ĝuste metis siajn hufojn sur la ĉapelplumojn de la ombro.

”Grim”, Torarin diris, ”ĉu ni demandu lin, ĉu li volas veturi kun ni al la urbo?”

La hundo tuj komencis levi sin, sed Torarin tiam metis la manon sur ĝian dorson. ”Estu trankvila, Grim, mia hundo! Mi vidas, ke vi ne ŝatas la skotojn.”

Sir Archie ne rimarkis, ke iu estas tiel proksima al li. Li iris antaŭen sen rigardi malantaŭen. Torarin singarde flankenveturis por preteriri lin.

Sed en la sama momento Torarin post la skota sinjoro rimarkis ion, kio similis al ankoraŭ unu ombro. Li vidis ion, kio estis alta kaj maldika kaj griza, kaj kio ŝvebis antaŭen super la tero sen fari piedsignojn sur la vojo kaj sen knarigi la blankan neĝon.

La skoto iris antaŭen per longaj paŝoj. Li rigardis nek dekstren nek maldekstren. Sed la griza ombro glitis antaŭen tiel proksime post li, ke ŝajnis, ke ĝi volas flustri ion en lian oreilon.

Torarin malrapide veturis antaŭen, ĝis li estis sampaŝe kun ili. Li tiam vidis la vizaĝon de la skoto en la klara lunlumo. Li

iris kun kuntiritaj brovoj kaj aspektis incitita, kvazaŭ absorbita de penso, kiu malplaĉas al li.

Ĝuste kiam Torarin preterveturis lin, li turnis sin kaj rigardis post sin, kvazaŭ li rimarkus la ĉeeston de iu.

Torarin klare vidis, ke post sir Archie ŝteliras juna knabino en ĝispieda griza vesto, sed sir Archie ne vidis ŝin. Kiam li turnis la kapon malantaŭen, ŝi staris senmove trankvila, kaj la ombro de sir Archie sternis sin sur ŝin kaj kaŝis ŝin.

Sir Archie tuj returnis sin kaj daŭrigis sian iron, kaj ree la knabino rapidis antaŭen kaj iris, kvazaŭ ŝi flustrus en lian orelon.

Sed kiam Torarin vidis tion, kaptis lin timo pli granda ol li povis elteni. Li laŭte ekkriis, kaj vipis sian ĉevalon tiel, ke ĝi ŝvitegante kaj en plena galopo venis al la pordo de lia kabanino.

Persekuto

Sur la interna, alinsulara flanko de la Marstrandinsulo, kiu estas ŝirmita de girlando da insuloj kaj insuletoj, estis la urbo kun ĉiuj siaj domoj kaj konstruaĵoj. Tie movis sin homoj sur stratoj kaj stratetoj, tie estis la haveno, plena de boatoj kaj ŝipoj, tie oni peklis haringon kaj senintestigis fiŝon, tie kuŝis preĝejo kaj tombejo, tie kuŝis konsilantara domo kaj vendoplaco, kaj tie estis multaj altaj arboj, kiuj somere balanciĝis kun verda foliaro.

Sed sur tiu duono de la Marstrandinsulo, kiu kuŝas okcidente kaj marflanke kaj estas ŝirmita nek de insuloj nek de rokinsuletoj, tie estas nur dezertaj, nudaj rokoj kaj disŝiritaj montlangoj, kiuj elstaris en la maron. Tie estas erikaj tufoj kun brunaj suproj, pikaj densaĵoj el dornarbustoj, kavoj por lutro kaj vulpo kaj nestoj por molanaso kaj mevo, sed neniuj vojetoj, neniuj domoj kaj neniuj homoj.

La kabano de Torarin kuŝis alte sur la dorso de la insulo, tiel ke la urbo estis sur unu flanko kaj la sovaĝejo sur la alia. Kaj kiam Elseto malfermis sian pordon, kuŝis antaŭ ŝi larĝaj, nudaj rokplataĵoj, de kiuj ŝi povis rigardi malproksimen okcidenten ĝis la malhela rando, kie la maro estis senglacia.

Ĉiuj maristoj kaj fiŝistoj, kiuj estis frostfiksitaĵoj en Marstrand kutimis preteriri la kabanon de Torarin por supreniri la rokojn kaj rigardi, ĉu la golfoj kaj akvokoloj ankoraŭ ne komencis deĵeti sian glacian kovraĵon.

Elseto multfoje staris en la pordo, kaj postrigardis tiujn, kiuj iris supren. Ŝia koro suferis post la granda doloro, kiu trafis ŝin, kaj ŝi pensis: "Ŝajnas al mi, ke ĉiuj estas feliĉaj, kiuj havas ion, kion ili sopiras. Sed mi posedas nenion en la tuta mondo, kion mi povas sopiri."

Iun vesperon Elseto vidis, ke alta viro, kiu portas larĝgrandan ĉapelon kun granda plumo, staras sur la rokplataĵoj kaj rigardas okcidenten trans la maron kiel ĉiuj aliaj. Kaj Elseto tuj vidis, ke la viro estas sir Archie, la estro de la skotoj, kiu parolis kun ŝi sur la varfoj.

Kiam li preteriris la kabanon, irante hejmen al la urho, Elseto ankoraŭ staris en la pordo, kaj ŝi ploris.

"Kial vi ploras?" li demandis kaj haltis antaŭ ŝi.

"Mi ploras, ĉar mi havas nenion, al kio mi povas sopiri," Elseto diris. "Kiam mi vidis vin stari sur la roko, kaj rigardi al la maro, mi pensis: 'Certe sur la alia flanko de la maro li havas hejmon, al kiu li veturos'."

Tiam la koro de sir Archie moliĝis, kaj li diris: "Dum longaj jaroj neniu parolis kun mi pri mia hejmo. Dio scias, kiel nun statas sur la bieno de mia patro. De tie mi veturis, kiam mi estis deksepjara, por servi en fremdaj armeoj."

Poste sir Archie iris en la ĉambron al Elseto, kaj li komencis paroli kun ŝi pri sia hejmo. Kaj Elseto sidis senmova kaj longe aŭdis la parolon de sir Archie. Ŝi sentis sin feliĉa pro ĉiu vorto, kiun diris sir Archie.

Sed kiam venis la tempo, kiam sir Archie volis foriri, tiam li petis Elseton pri permeso kisi ŝin.

Tiam Elseto diris ne kaj forrapidis al la pordo, sed sir Archie baris ŝian vojon kaj devigis ŝin.

Sed en la sama momento la pordo malfermiĝis, kaj la mastrino tre rapide envenis.

Tiam sir Archie retiris sin de Elseto. Li nur prezentis sian manon al ŝi por diri ĝis revidon kaj forrapidis.

Sed la patrino de Torarin diris al Elseto: "Estis bone de vi, ke vi sendis sciigon al mi. Ne decas, ke juna fraŭlino sidas sola en ĉambro kun tia homo, kia estas sir Archie. Tion vi ja scias, ke dungosoldato posedas nek honeston nek konsciencon."

"Ĉu mi sendis sciigon al vi?" Elseto tiun mirigite demandis.

"Jes," respondis la maljunulino, "kiam mi staris sur la varfo ĉe la laboro, venis malgranda fraŭlino, kiun mi antaŭe ne vidis, kaj diris, ke vi salutis kaj petis, ke mi venu hejmen."

"Kiel aspektis la fraŭlino?" Elseto diris.

"Mi ne tiom rigardis ŝin, ke mi povas diri al vi, kia ŝi aspektis," la maljunulino diris, "sed tion mi rimarkis, ke ŝi tiel facile paŝis sur la neĝo, ke neniuj sonoj estis aŭdeblaj."

Kiam Elseto aŭdis tion, ŝi fariĝis tute pala kaj diris: "Tiam certe estis unu el la anĝeloj de la ĉielo, kiu portis al vi la sciigon kaj kondukis vin hejmen."

II.

Alian fojon sir Archie sidis en la dometo de Torarin kaj parolis kun Elseto.

Ili estis solaj. Ili parolis bonhumore unu kun la alia kaj estis tre gajaj.

Sir Archie parolis kun Elseto pri tio, ke ŝi akompanu lin al

Skotlando. Tie li konstruos kastelon al ŝi kaj faros ŝin alt-ranga kastelsinjorino. Li diris al ŝi, ke ŝi havos cent paĝiinojn sub si, kaj ke ŝi dancos ĉe la kortego de la reĝo.

Elseto silentis, aŭskultante al ĉiu vorto, kiun sir Archie diris al ŝi, kaj ŝi kredis ĉiujn. Kaj sir Archie pensis, ke neniam li renkontis knabinon, kiun li tiel facile ensorĉis, kiel Elseton. Subite sir Archie eksilentis kaj rigardis malsupren sur sian maldekstran manon.

”Kio estas, sir Archie, kial vi ne parolas plu?” Elseto demandis.

Sir Archie krampfe fermis kaj malfermis la manon kaj turnis ĝin tien kaj reen.

”Kio estas, sir Archie?” Elseto demandis. ”Ĉu via mano ekdoloris?”

Tiam sir Archie kun timigita vizaĝo turnis sin al Elseto kaj diris: ”Ĉu vi vidas la harojn, Elseto, kiuj estas vinditaj ĉirkaŭ mia mano?”

Kiam li komencis paroli, la juna knabino nenion vidis, sed antaŭ ol li finis, ŝi vidis strion el helaj delikataj haroj vindi sin kelkfoje ĉirkaŭ la mano de sir Archie.

Kaj la juna knabino terurite eksaltis kaj elkriis: ”Sir Archie, kies haroj estas vinditaj ĉirkaŭ via mano?”

Sir Archie konsternite kaj ŝanceliĝe rigardis al ŝi. ”Mi sentas, Elseto, ke tio ĉi estas veraj haroj. Malvarmete kaj mole ili kuŝas ĉirkaŭ la mano. Sed de kie ili venis?”

La knabino fikse rigardis la manon per okuloj, kiuj ŝajne preskaŭ povus fali el la kapo.

”Tiamaniere la haroj de mia nutrofratino estis vinditaj ĉirkaŭ la mano de tiu, kiu mortigis ŝin,” ŝi diris.

Sed nun sir Archie komencis ridi. Li rapide retiris sian manon.

”Jen,” li diris, ”vi kaj mi, Elseto, timigas nin kiel infanetoj. Estis nur kelkaj fortaj sunradioj, kiuj enfalis tra la fenestro.”

Sed la juna knabino komencis plori kaj diris:

”Nun ree ŝajnas al mi, ke mi kuŝas sur la forno kaj vidas la murdistojn en ilia agado. Ho, mi tamen longe esperis, ke ili ne trovos mian karan nutrofratinon, sed fine unu el ili venis kaj tiris ŝin de la forno, kaj kiam ŝi volis forkuri, li vindis ŝiajn harojn ĉirkaŭ sian manon kaj firmtenis ŝin. Sed ŝi kuŝis surgenue antaŭ li kaj diris: ’Vidu mian junecon! Indulgu min, por ke mi vivu tiel longe, ke mi komprenos, kial mi venis en la mondon! Mi nenion malbonan faris, kial vi do volas mortigi min? Kial vi malpermesas al mi vivi?’ Kaj li ne aŭskultis al ŝi sed mortigis ŝin.”

Dum Elseto diris tion, sir Archie staris kun tiritaj brovoj kaj rigardis flanken.

”Jes, se mi iam renkontus tiun viron...,” Elseto diris. Ŝi staris antaŭ sir Archie kun pugnitaj manoj.

”Vi ne povas renkonti tiun viron,” sir Archie diris. ”Li mortis.” Sed la knabino ĵetis sin sur la benkon kaj plorĝemis.

”Sir Archie, sir Archie, kial vi igis min pensi pri la mortintoj? La tutaj vesperon kaj nokton mi nun devos plori. Foriru de mi, sir Archie, ĉar nun mi povas pensi nur pri la mortintoj! Nun mi devas pensi pri mia nutrofratino, kiel bonkora ŝi estis al mi.”

Kaj sir Archie ne povis konsoli ŝin, sed lin forpelis larmoj kaj ĝemoj, kaj li iris al siaj trinkfratoj.

III.

Sir Archie ne povis kompreni, kial lia kapo ĉiam estas tiel plena de pezaj pensoj. Li ne forgesis ilin, kiam li parolis kun Elseto, kaj ankaŭ ne, kiam li sidis kaj trinkis kun siaj kamaradoj. Se li dancis en la bordmagazenoj ĝis la fino de la nokto, li ne povis forigi ilin, kaj li ne povis forkuri de ili, se li iris multmejle eksteren sur la glacikovrita maro.

”Kial mi ĉiam memoras tion, kion mi ne volas?” sir Archie diris al si mem. ”Estas al mi, kvazaŭ iu ĉiam ŝtelirus malantaŭ mi, kaj flustrus en mian orelon.”

”Estas al mi, kvazaŭ iu farus reton ĉirkaŭ mi,” diris sir Archie, ”por kapti ĉiujn miajn pensojn kaj lasi nur tiun solan. Mi ne povas vidi la ĉasiston, kiu metas la reton, sed mi aŭdas liajn paŝojn, kiam li ŝteliras post mi.”

”Estas al mi, kvazaŭ pentristo irus antaŭ mi kaj pentrus ĉion, kion mi rigardas, sed ĉiam la saman bildon,” diris sir Archie. ”Se mi turnas la rigardojn al la ĉielo aŭ al la tero, mi tamen vidas nur unu aferon.”

”Estas al mi, kvazaŭ ŝtonhakisto sidus ĉe mia koro kaj tie enbatus unu solan malĝojon,” diris sir Archie. ”Mi ne povas vidi tiun ŝtonhakiston, sed tage kaj nokte mi aŭdas, kiel lia martelego martelas kaj batas. ’Vi ŝtonkoro, vi ŝtonkoro’ li diras, ’nun vi devas cedi. Nun mi enmartelos en vin malĝojon.’”

Sir Archie havis du amikojn, sir Filip kaj sir Regibald, kiuj ĉiam akompanis lin. Ili malĝojis pro tio, ke li ĉiam estas malgaja kaj ke nenio donas al li feliĉon.

”Kio mankas al vi?” ili diris. ”Kial viaj okuloj tiel brulas, kaj kial viaj vangoj estas tiel palaj?” Sir Archie ne volis diri al ili, kio turmentas lin. Li pensis: ”Kion miaj kamaradoj dirus pri

mi, se ili trovus, ke min regas nevirecaj sentoj? Ili ne obeus min plu, se ili ekscius, ke min turmentas pento pro faro, kiu estis necesa.”

Kiam ili ĉiam pli altrudis sin, li diris al ili por erarigi ilin:

”Okazas tiel strange al mi en tiuj ĉi tagoj. Estas fraŭlino, kiun mi volas gajni, sed mi ne povas kapti ŝin. Ĉiam io baras mian vojon.”

”Povas esti, ke la fraŭlino ne amas vin?” diris sir Reginald.

”Mi certe kredas, ke ŝia penso turnas sin al mi,” sir Archie diris, ”sed estas io, kio gardas ŝin, tiel ke mi ne povas kapti ŝin.”

Tiam sir Reginald kaj sir Filip komencis ridi, kaj ili diris: ”Tiun knabinon ni certe havigos al vi.”

Vespere Elseto iris sola sur la strateto. Ŝi venis laca de la laboro, kaj ŝi pensis: ”Tiu ĉi vivo estas kruda, kaj ĝi donas neniun ĝojon al mi. Min naŭzas la fiŝodoro, kiun mi sentas la tutan tagon. Min naŭzas, kiam mi aŭdas la aliajn virinojn ŝerci kaj ridi per tiel malmolaj voĉoj. Min naŭzas la malsataj mevoj, kiuj flugas super la tabloj kaj volas ŝiri la fiŝpecojn el miaj manoj. Se iu nur venus kaj kondukus min de tie ĉi! Tiam mi akompanus lin al la fino de la mondo.”

Kiam Elseto iris sur la plej malluma parto de la strateto, sir Reginald kaj sir Filip elvenis el la ombro kaj salutis ŝin.

”Fraŭlino Elseto,” ili diris. ”Ni portas al vi sciigon de sir Archie. Li kuŝas malsana hejme en la loĝejo. Li sopiras al interparolo kun vi kaj petas, ke vi akompanu nin hejmen al li.”

Elseto komencis timi, ke sir Archie povas esti tre malsana, kaj ŝi tuj returnis sin kaj sekvis la du skotajn sinjorojn, kiuj volis konduki ŝin al li.

Sir Filip kaj sir Reginald iris unu ĉe ĉiu flanko de ŝi. Ili ri-

detis unu al la alia kaj pensis, ke nenio povus esti pli facila ol ensorĉi Elseton.

Elseto tre rapidis. Ŝi preskaŭ kuris malsupren sur la strateto. Sir Filip kaj sir Reginald devis fari longajn paŝojn por povi sekvi ŝin.

Sed kiam Elseto tiel rapidis, io komencis ruliĝi antaŭ ŝiaj piedoj. Estis io, kio ĵetiĝis antaŭ ŝi, kaj ŝi preskaŭ faletis super ĝi.

”Kio ruliĝas kaj moviĝas antaŭ miaj piedoj?” Elseto pensis. ”Ŝajnas ke estas ŝtono, kiun mi piedbate malfiksis el la tero, kaj kiu ruliĝas malsupren sur la deklivo.”

Ŝi havis tian urĝon veni al sir Archie, ke malplaĉis al ŝi esti malhelpata de tio, kio ruliĝas tuj antaŭ ŝiaj piedoj. Ŝi piedbatis ĝin flanken, sed ĝi tuj revenis kaj ruliĝis antaŭ ŝi malsupren sur la strateto.

Elseto aŭdis, ke sonas kiel arĝento, kiam ŝi piedbatis ĝin flanken, kaj ŝi vidis, ke ĝi lumas kaj briletas.

”Ne estas ordinara ŝtono,” Elseto pensis. ”Mi kredas, ke estas arĝenta monero.” Sed ŝi havis tian urĝon veni al sir Archie, ke ŝi opiniis, ke ŝi ne havas tempon levi ĝin de la strato.

Sed ree ĝi ruliĝis antaŭ ŝiaj piedoj, kaj ŝi pensis: ”Vi venos pli rapide, se vi klinos vin kaj levos ĝin. Vi povas forĵeti ĝin malproksimen, se estas nenio.”

Ŝi klinis sin kaj levis ĝin. Estis granda arĝenta monero, kiu brilis blanke en ŝia mano.

”Kion vi trovis sur la strato, fraŭlino?” sir Reginald diris. ”Ĝi brilas tiel blanke en la lunlumo.”

Ili ĝuste tiam preteriris unu el la grandaj bordmagazenojn, kie fremdaj fiŝistoj loĝis, kiam ili restis en Marstrand por sia

laboro. Antaŭ la enirejo pendis korna lanterno, kiu ĵetis malfortan lumon sur la straton.

”Montru al ni, kion vi trovis, fraŭlino!” diris sir Filip kaj haltis sub la lanterno.

Elseto tenis la moneron alte kontraŭ la lanterno, kaj apenaŭ ŝi estis ekrigardinta ĝin, kiam ŝi komencis krii: ”Tiu estas unu el la moneroj de sinjoro Arne! Mi rekonas ĝin. Tio estas unu el la moneroj de sinjoro Arne!”

”Kion vi diras, fraŭlino?” demandis sir Reginald. ”Kial vi diras, ke tio estas unu el la moneroj de sinjoro Arne?”

”Mi konas ĝin,” Elseto diris. ”Mi ofte vidis sinjoron Arne teni ĝin en sia mano. Jes, estas unu el la moneroj de sinjoro Arne.”

”Ne krii tiel laŭte, fraŭlino!” sir Filip diris. ”Jen jam venas homoj, kiuj alkuras por ekscii, kial vi krias.”

Sed Elseto ne aŭskultis al sir Filip. Ŝi vidis, ke la pordo de la bordmagazeno estas malfermita. Meze sur la planko brulis fajro, kaj ĉirkaŭ ĝi sidis multaj viroj en malrapida kaj trankvila interparolo.

Elseto enkuris al ili. La moneron ŝi tenis alte levita.

”Ekatentu, ĉiuj homoj!” ŝi vokis. ”Nun mi scias, ke la murdintoj de sinjoro Arne estas en la vivo. Jen! Mi trovis unu el la moneroj de sinjoro Arne!”

Ĉiuj viroj turnis sin kontraŭ ŝin. Ŝi tiam vidis, ke ankaŭ Torarin fiŝvendisto sidas tie en la rondo.

”Pri kio vi krias, fraŭlino?” nun demandis Torarin. ”Kiel vi povas diferencigi la monerojn de sinjoro Arne de aliaj moneroj?”

”Certe mi povas diferencigi tiun ĉi moneron de ĉiuj aliaj,” Elseto diris. ”Ĝi estas malnova kaj granda, kaj ĝi havas eltran-

ĉaĵon ĉe la rando. Sinjoro Arne diris, ke ĝi estas el la tempo de la malnovaj norvegaj reĝoj, kaj neniam li fordonis ĝin por pagi iun aĉeton.”

”Nun vi rakontu, kie vi trovis ĝin,” diris iu alia el la fiŝistoj.

”Mi trovis ĝin sur la strato, ruliĝantan antaŭ miaj piedoj,” Elseto diris. ”Tie certe unu el la murdintoj perdis ĝin.”

”Povas esti vera, kion vi diras,” Torarin diris, ”sed kion ni povas fari al tio? Ni ne povas trovi la murdintojn nur pro tio, ke vi scias, ke ili iris sur unu el niaj stratoj.”

La fiŝistoj trovis, ke Torarin parolis saĝe. Ili ree eksidis ĉirkaŭ la fajro.

”Vi venu hejmen kun mi, Elseto!” Torarin diris. ”Nun ne estas tempo por fraŭlino kuri sur stratoj kaj placoj.

Kiam Torarin diris tion, Elseto rigardis post sin al siaj akompanantoj. Sed sir Reginald kaj sur Filip jam ŝtele foriris, sen ke ŝi rimarkis tion.

En la gastejo de la urbodomo

La mastrino en la gastejo de la urbodomo iun matenon malfermis la pordojn por balai la ŝtuparon kaj vestiblon. Tiam ŝi vidis junan knabinon sidi sur unu el la ŝtupoj kaj atendi. Ŝi estis vestita per ĝispieda, griza vesto, kiu per zono estis fiksita ĉirkaŭ la talio. La haroj estis helaj, kaj ili estis nek plektitaj nek kunligitaj surkape sed pendis malsupren ambaŭflanke de la vizaĝo.

Kiam la pordo estis malfermita, ŝi levis sin kaj iris malsupren sur la ŝtuparo en la vestiblon, sed ŝajnis al la mastrino, ke ŝi iras kvazaŭ en dormo. La tutan tempon ŝi tenis la palpebrojn mallevitaj kaj la brakojn forte premitaj al la korpo. Ju pli proksime ŝi venis, des pli miris la mastrino, ke ŝi estas tiel malforta kaj delikata. Ankaŭ ŝia vizaĝo estis bela, sed ĝi estis maldika kaj diafana kvazaŭ ĝi estus farita el rompiĝema vitro.

Kiam ŝi venis al la mastrino, ŝi demandis, ĉu ekzistas ia ofico, kiun ŝi povas prizorgi kaj petis pri dungigo.

Tiam la mastrino pensis pri ĉiuj sovaĝoj viroj, kiuj en la vesperoj kutime sidis en la trinkejo trinkante bieron kaj vinon, kaj ŝi ne povis reteni rideton. "Ne, tie ĉi ne estas ofico por tiel malforta fraŭlino kiel vi," ŝi diris.

La fraŭlino nek levis la okulojn nek faris la plej etan movon, sed ree ŝi petis pri dungigo. Ŝi postulis nek manĝaĵon nek salajron, nur volis havi okupon por prizorgi. "Ne," la ma-

strino diris, "se mia propra filino estus kiel vi, mi malpermesus tion al ŝi. Mi deziras al vi pli bonan sorton ol oficon ĉe mi."

La juna fraŭlino malrapide supreniris la ŝtuparon, kaj la mastrino postrigardis ŝin. Tiam ŝi aspektis tiel malgranda kaj senhelpa, ke la mastrino ekkompatis ŝin.

Ŝi revokis ŝin kaj diris al ŝi: "Eble pli grandaj danĝeroj minacas vin, se vi sola iras sur stratoj kaj stratetoj, ol se vi venas al mi. Vi povas resti ĉe mi hodiaŭ kaj lavi pladojn kaj tasojn, kaj mi tiam vidos, por kio vi taŭgas."

La mastrino kondukis ŝin al malgranda ĉambro, kiun ŝi farigis malantaŭ la gasteja salono. Ĝi ne estis pli granda ol ŝranko, kaj tie estis nek fenestro nek lumtruo, kaj ĝi ricevis sian lumon nur tra giĉeto en la muro al la trinkejo.

"Restu tie ĉi hodiaŭ," la mastrino diris al la juna knabino, "kaj lavu ĉiujn pladojn kaj tasojn, kiujn mi donos al vi tra tiu ĉi giĉeto, kaj tiam mi vidos, ĉu vi povos resti en servo ĉe mi."

La juna knabino iris en la ĉambreton, kaj ŝi movis sin tiel silente, ke la mastrino pensis, ke estas kvazaŭ mortinto englutus en sian tombon.

Ŝi staris tie la tutan tagon, kaj ŝi nek parolis al iu nek klinis la kapon tra la giĉeto por rigardi la homojn, kiuj iris tien kaj reen en la gasteja salono. Kaj ŝi ankaŭ ne tuŝis la manĝaĵon, kiun oni metis al ŝi.

Neniu aŭdis ŝin fari bruon dum la lavado, sed kiam ajn la mastrino etendis la manon al la giĉeto, ŝi transdonis al ŝi freŝlavitajn pladojn kaj tasojn, sur kiuj ne estis eĉ la plej eta makulo.

Sed kiam la mastrino prenis ilin por meti ilin sur la tablojn, ili estis tiel malvarmaj, ke ŝajnis al ŝi, ke ili povas forbruli la

haŭton de la fingroj. Kaj ŝi frostotremis kaj diris: "Estas, kva-
zaŭ mi prenis ilin el la manoj de la malvarma morto."

II.

Lun tagon ne estis fiŝo por preparo sur la varfoj, kaj Elseto povis resti hejme. Ŝi sidis sola en la ĉambro kaj ŝpinis. Bona fajro brulis sur la fajrejo, kaj estis sufiĉe lume en la ĉambro.

Meze dum la laboro ŝi eksentis malfortan bloveton, kva-
zaŭ malvarma vento tuŝun ŝian frunton. Ŝi levis la okulojn
kaj vidis tiam, ke ŝia mortinta nutrofratino staras antaŭ ŝi sur
la planko. Elseto metis la manon sur la ŝpinilon, haltigante
ĝin, kaj senmove rigardis sian nutrofratinon.

Unue ŝi ektimis, sed ŝi pensis: "Ne decas al mi ektimi mian
nutrofratinon. Ĉu ŝi estas mortinta ĉu vivanta, mi tamen es-
tas kontenta renkonti ŝin."

"Kara," ŝi diris al la mortintino, "ĉu vi deziras ion de mi?"

La alia tiam diris al ŝi per voĉo, kiu estis kaj senforta kaj
sentona: "Mia fratino Elseto, mi ricevis oficon en la gastige-
jo, kaj la mastrino la tutan tagon igis min lavi pladojn kaj ta-
sojn. Nun vespere mi estas tiel laca, ke mi ne eltenas plu. Mi
iris tien ĉi por demandi, ĉu vi ne volas veni kaj helpi min."

Kiam Elseto aŭdis tion, ŝajnis al ŝi, ke vualo sternas sin sur
ŝia komprenpovo. Ŝi ne povis plu pensi aŭ miri aŭ senti ti-
mon. Ŝi povis nur senti ĝojon pro tio, ke ŝi revidas sian nu-
trofratinon, kaj ŝi respondis: "Jes, kara, mi volas tuj veni kaj
helpi vin."

Tiam la mortinto iris al la pordo kaj Elseto sekvis ŝin. Sed
kiam ili staris sur la sojlo, la nutrofratino de Elseto haltis kaj

diris al ŝi: "Vi surmetu vian mantelon. Ekstere blovas forta ŝtormo." Kaj kiam ŝi diris tion, ŝia voĉo sonis iom pli klara ol antaŭe kaj malpli sentona.

Elseto tiam prenis sian mantelon de la muro kaj metis ĝin ĉirkaŭ sin. Ŝi pensis: "Mia nutrofratino ankoraŭ amas min. Ŝi ne volas malbonon al mi. Mi estas feliĉa, kiam mi nur povas sekvi ŝin, kien ajn ŝi volas konduki min."

Poste ŝi sekvis la mortintinon tra multaj stratoj, de la domo de Torarin, kiu kuŝis sur ŝtonplena deklivo, ĝis la pli ebenaj stratoj ĉe la haveno kaj la placo.

La mortintino la tutan tempon iris du paŝojn antaŭ Elseto. Estis forta ŝtormo, kiu hurlis tra la stratetoj tiun vesperon, kaj Elseto rimarkis, ke kiam la vento venas tre forte kaj volas premi ŝin kontraŭ muron, tiam la mortintino starigas sin inter ŝin kaj la venton kaj ŝirmas ŝin per sia malforta korpo, tiom kiom ŝi povas.

Kiam ili fine venis al la urbodomo, la mortintino malsupreniris la gastejŝtuparon kaj mansignis al Elseto, ke ŝi sekvu. Sed kiam ili iris sur la ŝtuparo, la vento estingis la kandelon en la lanterno, kiu pendis en la vestiblo, kaj ili staris en mallumo. Tiam Elseto ne sciis, kien ŝi direktu siajn paŝojn, sed la mortintino devis meti sian manon sur la ŝian por konduki ŝin. Sed la mano de la mortintino estis tiel malvarma, ke Elseto ekskuiĝis kaj komencis tremegi pro teruro. Tiam la mortintino forprenis sian manon kaj ĉirkaŭvindis ĝin per la rando de la mantelo de Elseto, antaŭ ol ŝi ree provis konduki ŝin. Sed Elseto sentis la glacian malvarmon tra subŝtofo kaj peltaĵo. Jen la mortintino kondukis Elseton tra longa pasejo kaj poste malfermis pordon por ŝi. Ili venis en malgrandan, malluman ĉambreton, en kiun falis malforta lumo tra ĝiĉe-

to en la muro. Elseto vidis, ke ili troviĝas en ĉambro, kie ordinare staras la helpknabino de la mastrino por lavi pladojn kaj tasojn, kiujn ŝi bezonas por meti sur la tablojn al la gastoj. Elseto povis videti, ke sur benketo staras akvokuvo, kaj en la giĉeto staris multaj pokaloj kaj vazoj, kiuj bezonis lavon.

”Ĉu vi volas helpi min hodiaŭ vespere pri tiu ĉi laboro, Elseto?” diris la mortintino.

”Jes kara,” Elseto diris, ”vi scias, ke mi volas helpi vin pri ĉio, kion vi deziras.”

Kaj je tio Elseto demetis la mantelon. Ŝi suprenfaldis la robmanikojn kaj komencis labori.

”Ĉu vi volas esti tre silenta kaj trankvila tie ĉi, Elseto, por ke la mastrino ne rimarku, ke mi havigis helpon al mi?” ”Jes, kara,” Elseto diris, ”tion mi certe volas.”

”Jes, do adiaŭ, Elseto!” diris la mortintino. ”Nun mi ankoraŭ petas vin pri nur unu afero. Kaj tio estas, ke vi post tio ĉi ne tro multe koleros al mi.”

”Kio estas tio, ke vi diras adiaŭ al mi?” Elseto diris. ”Volonte mi venos ĉiujn vesperojn kaj helpos al vi.”

”Ne, post hodiaŭ vi certe ne bezonos veni,” la mortintino diris. ”Mi pensas, ke vi hodiaŭ nokte helpos min tiel, ke mi povos plenumi mian komision.”

Dum ili tiel parolis, Elseto jam klinis sin super la laboron. Dum momento ĉio estis silenta, sed poste ŝi sentis malfortan bloveton sur la frunto, same kiel kiam la mortintino venis al ŝi en la kabano de Torarin. Ŝi tiam levis la okulojn kaj rimarkis, ke ŝi estas sola. Ŝi komprenis, kio sentiĝis kiel malforta vento sur ŝia frunto, kaj ŝi diris al si mem: ”Mia mortinta nutrofratino kisis mian frunton, antaŭ ol ŝi foriris.”

Elseto nun unue pretiĝis sian laboron. Ŝi lavis ĉiujn pelve-

tojn kaj kruĉojn kaj viŝis ilin. Poste ŝi iris al la giĉeto por rigardi, ĉu oni metis novajn tien. Ŝi ne trovis iujn, kaj ŝi tiam restis ĉe la giĉeto kaj rigardis en la gastejan salonon.

Estis tia momento en la tago, kiam gastoj ordinare ne venis al la gastejo. La mastrino ne sidis ĉe sia servotablo, kaj neniu el ŝiaj servistoj estis en la ĉambro. La solaj, kiuj troviĝis tie, estis tri viroj sidantaj ĉe la ekstremo de granda tablo. Ili estis gastoj, tamen ŝajnis tre hejmecej tie, ĉar unu el ili, eltrinkinte sian pokalon, iris al la servotablo, plenigis ĝin el unu el la grandaj bareloj kun biero kaj vino, kiuj kuŝis tie, kaj ree eksidis por trinki.

Elseto staris tie, kvazaŭ ŝi estus veninta el fremda mondo. Ŝiaj pensoj estis ĉe la mortinta nutrofratino, kaj ŝi ne povis klare percepti, kion ŝi vidas. Longa tempo pasis antaŭ ol ŝi rimarkis, ke la tri viroj ĉe la tablo estas bone konataj al ŝi kaj karaj. Ĉar tiuj, kiuj sidis tie, estis sir Archie kaj liaj du amikoj sir Reginald kaj sir Filip.

Dum la lastaj tagoj sir Archie ne venis al Elseto, kaj nun ŝi ekĝojis vidante lin. Ŝi tuj volis voki al li, ke ŝi estas tute proksime, sed tiam ŝi ekpensis, ke estas strange, ke li ne plu venas al ŝi, kaj ŝi restis silenta. "Eble li ekamis alian," Elseto pensis. "Eble li nun pensas pri ŝi."

Ĉar sir Archie sidis iom for de la aliaj. Li sidis silenta kaj fiksrigardis antaŭ sin, sen trinki. Li ne partoprenis la interparolon, kaj kiam liaj amikoj diris ion al li, li plej ofte ne respondis.

Elseto aŭdis, ke la aliaj provas gajigi lin. Ili demandis, kial li ne trinkas. Ili eĉ konsilis al li iri por interparoli kun Elseto por ree gajiĝi.

"Ne pensu pri mi," sir Archie diris. "Estas iu alia pri kiu mi

ĉiam pensas. Ĉiam mi vidas ŝin antaŭ mi, kaj ĉiam ŝia voĉo sonas en miaj oreloj.”

Kaj Elseto vidis, ke sir Archie fiksrigardas rekte al unu el la dikaj kolonoj, kiuj subportis la gastejan plafonon. Nun ŝi ankaŭ vidis, kion ŝi antaŭe ne rimarkis, ke ŝia nutrofratino staras apud tiu kolono kaj rigardas al sir Archie. Ŝi staris tie tute senmova en sia griza vesto, kaj ne estis facile distingi ŝin, kiam ŝi premis sin al la kolono. Elseto staris tre silenta kaj rigardis en la ĉambron. Ŝi rimarkis, ke ŝia nutrofratino levis siajn okulojn, kiam ŝi rigardis al sir Archie. Dum la tuta tempo, kiam ŝi estis kun Elseto, ŝi iris kun mallevitaj okuloj.

Kaj ŝiaj okuloj estis la sola, kio estis terura ĉe si. Ili estis senvivaj kaj senbrilaj, kaj la lumo ne plu reflektiĝis en ili.

Post momento sir Archie ree komencis lamenti. ”Mi ĉiam vidas ŝin. Ŝi sekvas min, kien ajn mi iras,” li diris.

Li sidis kun la vizaĝo al la kolono, kie staris la mortintino, kaj fiksrigardis al ŝi. Sed Elseto komprenis, ke li ne vidas la mortintinon. Li ne parolis pri ŝi sed pri iu, kiu ĉiam estis en liaj pensoj.

Elseto restis ĉe la ĝiceto kaj sekvis ĉion, kio okazis. Ŝi pensis, ke ŝi antaŭ ĉio alia volas ekscii, kiu ĉiam estas en la pensoj de sir Archie.

Subite ŝi rimarkis, ke la mortintino eksidis sur la benko apud sir Archie kaj flustras en lian oreilon.

Sed sir Archie ankoraŭ ne sciis, ke ŝi estas tiel proksime, kaj ke ŝi sidas kaj flustras en lian oreilon. Li rimarkis ŝian ĉeeston nur pro la terura angoro, kiu ekpremis lin.

Elseto vidis, ke sir Archie metis sian kapon en la manojn kaj ploris, kiam la mortintino estis flustrinta al li dum kelkaj momentoj. ”Ho, ke mi neniam estu trovinta la fraŭlinon!” li

diris. "Mi pentas nur tion, ke mi ne lasis la fraŭlinon vivi, kiam ŝi petis min."

La du aliaj skotoj ĉesis trinki kaj ekrigardis timigite al sir Archie, kiu tiamaniere forlasis ĉian virecon kaj donis lokon al pento. Ili dum momento sidis sendecidaj, sed poste unu el ili iris al la servotablo, prenis la plej grandan trinkokruĉon kaj plenigis ĝin per ruĝa vino. Poste li iris al sir Archie, batetis sur lian ŝultron kaj diris: "Trinku, mia frato! La mono de sinjoro Arne ankoraŭ daŭras. Tiel longe, ke ni havas monon por havigi al ni tian vinon, ni ne bezonas esti viktimoj de malgajo."

Sed en la sama momento, kiam jenaj vortoj estis diritaj: "Trinku, mia frato! La mono de sinjoro Arne ankoraŭ daŭras," Elseto vidis, ke la mortintino levas sin de la benko kaj malaperas.

Kaj sammomente Elseto vidis antaŭ si tri virojn, kiuj havis grandajn barbojn kaj vilajn vestojn kaj kiuj batalis kontraŭ la domanoj de sinjoro Arne. Kaj nun ŝi ekkonis, ke ili estis la tri viroj, kiuj sidis en la gastejo: sir Archie, sir Filip kaj sir Reginald.

III.

Elseto iris el la ĉambro, kie ŝi staris kaj lavis la pokalojn de la mastrino, kaj silente fermis la pordon post si. En la mallarĝa pasejo ekster ĝi ŝi haltis. Ŝi apogis sin kontraŭ la muron kaj tie staris senmova preskaŭ unu horon.

Dum ŝi staris tie, ŝi pensis: "Mi ne povas perfidi lin. Li estu farinta kion ajn malbonan, sed mia koro estas plena de amo

al li. Mi ne povas sendigi lin al la radoj. Mi ne povas vidi, ke oni forbrulos de li manon kaj piedon.”

La ŝtormo, kiu furiozis la tutan tagon, kreskis kaj fariĝis pli kaj pli forta dum la paso de la vespero, kaj Elseto aŭdis ĝian fortan muĝon, kiam ŝi staris tie en la mallumo.

”Nun la unua printempa ŝtormo venis,” ŝi pensis. ”Nun ĝi potence venis por liberigi la maron kaj rompi la glacieron. Post kelkaj tagoj ni havos senglacian akvon, kaj tiam sir Archie foriros de tie ĉi, kaj neniam li revenos. Li ne plenumos pliajn malbonfarojn en tiu ĉi lando. Al kio do utilas, se oni kaptos kaj punos lin? Nek la vivantoj, nek la mortintoj havus iun ĝojon pro tio.”

Elseto volvis la mantelon pli bone ĉirkaŭ sin. Ŝi pensis ke ŝi iros hejmen kaj silente eksidos ĉe sia laboro sen malkaŝi la sekreton al iu ajn.

Sed antaŭ ol ŝi levis la piedojn por foriri, ŝi jam forlasis sian intencon kaj restis.

Ŝi staris silenta kaj aŭdis la ŝtormon muĝi. Ŝi pensis, ke baldaŭ estos printempo. La neĝo malaperos, kaj la tero vestos sin per verdo.

”Dio kompatu min, kia printempo estos al mi!” Elseto pensis. ”Neniu ĝojo kaj neniu feliĉo povas flori por mi post la malvarmo de tiu ĉi vintro.”

”Estis antaŭ nur unu jaro,” ŝi pensis. ”Tiam mi estis tiel feliĉa, kiam la vintro finiĝis kaj la printempo venis. Mi memoras unu vesperon, ĝi estis tiel bela, ke mi ne povis resti hejme ĉe la domo. Tiam mi prenis la manon de mia nutrofratino, kaj ni iris en la terenon por preni verdajn foliojn por ornami la fornon.”

Ŝi memorigis al si, kiel ŝi kaj ŝia nutrofratino iris laŭ ver-

da vojeto. Kaj tie apud la vojeto ili vidis malgrandan junbultulon, kiu estis dehakita. Vidante la lignon oni povis konkludi, ke ĝi estas hakita antaŭ pluraj tagoj. Sed nun ili vidis, ke la kompatinda dehakita arbo komencis verdiĝi, kaj ke ĝiaj folioj trabreĉis la burĝonojn.

Tiam ŝia nutrofratino haltis kaj klinis sin super la arbon. "Ho, kompatinda arbo," ŝi diris, "kian malbonon vi faris, ĉar vi ne povas morti, kvankam vi estas dehakita? Kial vi devas eligi viajn foliojn, kvazaŭ vi ankoraŭ vivus?"

Tiam Elseto ridis al ŝi kaj respondis: "Certe ĝi tiel dolĉe verdas por ke tiu, kiu hakis ĝin, vidu kian malbonon li faris kaj pentu."

Sed ŝia nutrofratino ne ridis. Al ŝi venis larmoj en la okulojn.

"Estas granda peko faligi arbon dum la foliiĝo, kiam ĝi estas tiel plena de forto, ke ĝi ne povas morti. Estas terure por mortinto, kiam li ne povas ripozi en sia tombejo. Tiuj, kiuj mortis, ne povas atendi multan bonon, nek amo nek feliĉo povas atingi ilin. La sola bono, kiun ili ankoraŭ deziras, estas dormi en silenta trankvilo. Ĉu mi ne ploru, kiam vi diras, ke la betulo ne povas morti pro tio, ke ĝi pensas pri siaj mortigintoj? Tamen estas la plej kruda sorto por iu, de kiu oni prenis la vivon, ke li ne povas dormi trankvile, ĉar li devas persekuti siajn murdintojn. La mortintoj ne povas celdi al io alia ol dormado en trankvilo.

Kiam Elseto memorigis al si tion, ŝi komencis plori kaj tordis siajn manojn.

"Mia nutrofratino ne trovas trankvilon en sia tombo," ŝi diris, "se mi ne malkaŝos mian amaton. Se mi ne helpos ŝin pri tio, ŝi devas vagi sur la tero sen ripozo kaj trankvilo. Mia

kompatinda nutrofratino, ŝi povas deziri al si nur trankvilon en la tombo, kaj tion mi ne povas doni al ŝi sen sendi mian amaton al la radoj.”

IV.

Sir Archie venis el la kela salono kaj iris tra la mallarĝa pasejo. Nun la lanterno, kiu pendis de la plafono, ree estis lumigita, kaj en ĝia lumo li vidis, ke juna fraŭlino apogas sin kontraŭ la muro.

Ŝi estis tre pala kaj staris tute senmove, kaj sir Archie ek-timis kaj pensis: ”Jen fine staras antaŭ miaj okuloj la mortintino, kiu persekutas min ĉiujn tagojn.”

Kiam sir Archie preterpasis Elseton, li metis sian manon sur ŝian por ekscii, ĉu vere estas mortintino, kiu staras tie. Kaj la mano estis tiel malvarma, ke li ne povis diri, ĉu ĝi apartenas al mortinto aŭ vivanto.

Sed kiam sir Archie tuŝis la manon de Elseto, ŝi retiris ĝin, kaj tiam sir Archie rekonis Elseton.

Li kredis, ke ŝi venis pro li, kaj li tre ĝojis vidi ŝin. En la sama momento penso trakuris lin: ”Nun mi scias, kion mi faru por ke la mortintino paciĝu kaj ĉesu persekuti min.”

Li prenis la manojn de Elseto inter la siajn kaj metis ilin al siaj lipoj. ”Dio benu vin, Elseto, pro tio ke vi hodiaŭ venis al mi!” li diris.

Sed la koro de Elseto estis plena de doloro. Pro larmoj ŝi ne povis paroli eĉ tiom, kiom ŝi bezonis por diri al sir Archie, ke ŝi ne venis por renkonti lin.

Sir Archie longe silentis, sed la tutan tempon li tenis la

manojn de Elseto inter la siaj. Kaj ju pli longe li staris tiel, des pli serena kaj bela fariĝis lia vizaĝo.

”Elseto,” sir Archie diris, kaj li parolis tre solene. ”Dum pluraj tagoj mi ne venis al vi, ĉar pezaj pensoj turmentis min. Ili neniam lasis min trankvila, kaj mi kredis, ke mi komencas perdi mian mensosanon. Sed hodiaŭ vespere fariĝis pli bone al mi, kaj mi ne vidas plu antaŭ miaj okuloj tiun bildon, kiu turmentis min. Kaj kiam mi trovis vin tie ĉi, mia koro diris al mi, kion mi faru por liberiĝi por ĉiam de la turmento.”

Li klinis sin por ke li povu rigardi en la okulojn de Elseto, sed ĉar ŝi staris kun mallevitaj palpebroj, li daŭrigis: ”Vi estas kolera al mi, Elseto, pro tio ke mi ne venis al vi dum pluraj tagoj. Sed mi ne povis veni al vi, ĉar kiam mi vidis vin, mi ankoraŭ pli estis memorigata pri tio, kio turmentas min. Kiam mi vidis vin, mi devis ankoraŭ pli multe pensi pri fraŭlino, kontraŭ kiu mi malbone agis. Cetere, Elseto, mi malbone agis kontraŭ multaj homoj, sed mia konscienco persekutas min nur pro tio, kion mi faris kontraŭ la juna fraŭlino.”

Kiam Elseto ankoraŭ silentis, li ree prenis ŝiajn manojn, metis ilin al siaj lipoj kaj kisis ilin.

”Aŭskultu jen, Elseto, kion mia koro diris al mi, kiam mi ekvidis, ke vi staras tie ĉi kaj atendas min! ’Vi malbone agis kontraŭ fraŭlino’ ĝi diris al mi, ’tial vi al alia rebonigu la suferojn, kiujn vi kaŭzis al ŝi. Vi prenu ŝin kiel edzinon, kaj vi estu tiel bona al ŝi, ke ŝi neniam sentos malĝojon. Vi havu al ŝi tian fidelon, ke vi amos ŝin pli en via lasta vivotago ol en via edziĝotago’.”

Elseto staris same kiel antaŭe kun mallevitaj okuloj. Tiam sir Archie metis sian manon sur ŝian kapon kaj levis ĝin. ”Mi devas scii, Elseto, ĉu vi aŭdas kion mi diras,” li diris.

Tiam li vidis, ke Elseto ploras tiel forte, ke grandaj larmoj falas sur la vangojn.

”Kial vi ploras, Elseto?” sir Archie diris.

”Mi ploras, sir Archie,” Elseto diris, ”pro tio ke mi en mia koro portas tro grandan amon al vi.”

Tiam sir Archie movis sin ankoraŭ pli proksimen al Elseto kaj metis sian brakon ĉirkaŭ ŝian talion. ”Ĉu vi aŭdas, kiel la ŝtormo muĝegas ekstere?” li diris. ”Tio signifas, ke la maro baldaŭ senglaciigos, kaj ke ŝipoj ree povos transveturi al mia hejmlando. Nun diru al mi, Elseto, ĉu vi volas akompani min tien, por ke mi povu al vi rebonigi tion, kion mi malbonfaris al iu alia.”

Sir Archie komencis flustri, al Elseto pri la dolĉa vivo, kiu atendas ŝin, kaj Elseto komencis pensi: ”Ho, se mi ne sciis pri la malbono, kiun li faris! Tiam mi akompanus lin kaj vivus feliĉa kun li.”

Sir Archie venis pli kaj pli proksime al ŝi, kaj kiam ŝi levis siajn rigardojn, ŝi ekvidis, ke lia vizaĝo estas klinita super ŝi, kaj ke li volas kisi ŝian frunton. Tiam ŝi ekmemoris pri la mortintino, kiu ĵus estis ĉe ŝi kaj kisis ŝin. Ŝi forŝiris sin de sir Archie kaj diris: ”Ne, sir Archie, mi neniam akompanos vin.”

”Tamen,” sir Archie diris, ”vi devas akompani min, se ne mi estos tirata en pereon.”

Li komencis flustri pli kaj pli amajn vortojn al la knabino, kaj ŝi ree pensis: ”Ĉu ne estus pli plaĉe al Dio kaj homoj, se li povus rebonigi sian malbonan vivon kaj fariĝi justema homo? Al kiu utilos, se oni punos kaj mortigos lin?”

Kiam Elseto komencis pensi tiel, venis du viroj, kiuj intencis eniri en la kelon. Kiam sir Archie rimarkis, ke ili ĵetas sci-volajn rigardojn al li kaj la knabino, li diris al ŝi:

”Venu, Elseto, kaj mi akompanos vin hejmen! Mi ne volas, ke iu vidu, ke vi venis al mi en la kelo.”

Tiam Elseto levis la okulojn, kvazaŭ ŝi subite ekmemorus, ke ŝi havas alian taskon por plenumi ol aŭskulti al sir Archie. Sed ŝia koro turmentis ŝin, kiam ŝi pensis pri malkaŝo de lia krimo. ”Se vi transdonos lin al la ekzekutisto, tiam mi rompiĝos,” ŝia koro diris al ŝi. Kaj sir Archie pli bone kuntiris la mantelon ĉirkaŭ ŝi kaj kondukis ŝin sur la straton. Poste li akompanis ŝin ĝis la dometo de Torarin. Kaj ŝi rimarkis, ke ĉiufoje, kiam la muĝeganta ŝtormo venas tro forte kontraŭ ili, li starigas sin antaŭ ŝin kaj protektas ŝin.

Kiam ili iris, Elseto pensis dum la tuta tempo: ”Mia mortinta nutrofratino ne sciis pri tio, ke li volas malkulpigi sian krimon kaj fariĝi bona homo.”

Sir Archie ankoraŭ flustris la plej dolĉajn vortojn en la oreilon de Elseto. Kaj ju pli longe Elseto aŭskultis al li, des pli certa fariĝis ŝia konvinko.

”Certe mia nutrofratino vokis min, por ke mi aŭskultu al sir Archie, kiam li flustras tiajn vortojn en mian oreilon,” ŝi pensis. ”Tiom ŝi amas min. Ŝi ne deziras al mi malfeliĉon sed feliĉon.” Kaj kiam ili haltis antaŭ la kabano, sir Archie ankoraŭ unu fojon demandis Elseton, ĉu ŝi volas akompani lin trans la maron. Kaj Elseto respondis, ke se Dio helpos, ŝi akompanos lin.

La senpaculino

La postan tagon la ŝtormo estis ĉesinta. Estis nun milda vetero, sed ĝi ne multe degeligis la glacieron, kaj la maro estis fermita same kiel antaue.

Kiam Elseto matene vekigis, ŝi pensis: "Vere estas pli bone ke malbonfaranto konvertiĝas kaj vivas laŭ la ordonoj de Dio, ol ke li estu punita kaj mortigita."

Dum la tago sir Archie sendis al Elseto homon, kiu kunportis al ŝi larĝan brakringon el oro.

Kaj Elseto ĝojis, ke sir Archie volas fari al ŝi grandan ĝojon, kaj ŝi dankis la senditon kaj akceptis la donacon.

Sed kiam li estis foririnta, ŝi ekpensis, ke sir Archie aĉetis al ŝi tiun ringon por la mono de sinjoro Arne. Ŝi ne povis elteni rigardi ĝin, kiam ŝi pensis pri tio. Ŝi forŝiris ĝin de la brako kaj ĵetis ĝin malproksimen de si.

"Kia estos mia vivo, se mi ĉiam devos pensi, ke mi vivas per la mono de sinjoro Arne?" ŝi pensis. "Se mi metos peĉeton da manĝaĵo al miaj lipoj, ĉu mi tiam ne devos pensi pri la rabita mono? Kaj se mi ricevos novan vestaĵon, tiam sonos en mia orelo, ke ĝi estas aĉetita por maljuste akirita havo. Nun mi tamen vidas, ke ne estas eble al mi akompani sir Archie kaj vivi la vivon kune kun li. Mi diros tion al li, kiam li venos al mi."

Proksime al la vespero sir Archie venis al ŝi. Li estis tute ĝoja, malbonaj pensoj ne estis turmentintaj lin, kaj li kredis,

ke tion kaŭzis tio, ke li promesis fari bonon al fraŭlino pro la malbonfaro al alia.

Kiam Elseto vidis lin kaj aŭdis lin paroli, ŝi ne povis diri al li, ke ŝi estas malĝoja kaj volas disiĝi de li.

Ĉiujn dolorojn, kiuj turmentis ŝin, ŝi forgesis, kiam ŝi aŭskultis al sir Archie.

La posta tago estis dimanĉo, kaj tiam Elseto iris en la preĝejon. Ŝi iris tien kaj al la tagmeza diservo kaj al la vespera.

Kiam ŝi dum la diservo sidis kaj aŭskultis al la pastro, ŝi aŭdis iun ĝemeti kaj plori tuj apud si.

Ŝi kredis, ke estas iu el tiuj, kiuj sidas apud ŝi en la benko, kiu ploras, sed rigardante dekstren kaj maldekstren ŝi vidis nur trankvilajn kaj solenajn homojn.

Malgraŭ tio ŝi klare aŭdis, ke iu ploras, kaj ŝajnis al ŝi, ke la plorantino estas tiel proksima al ŝi, ke ŝi povus tuŝi ŝin, nur etendante sian manon.

Elseto aŭdis, kiel suspiris kaj plorĝemetis, kaj ŝi pensis ke ŝi neniam aŭdis ion, kio sonis tiel malgaje.

”Kiu portas en si tian malĝojon, ke ŝi devas verŝi tiel amarajn larmojn?” Elseto pensis.

Ŝi rigardis malantaŭen kaj klinis sin antaŭen super la antaŭan benkon por vidi. Sed ĉiuj sidis silentaj, kaj sur nenies vizaĝo estis larmoj.

Tiam Elseto pensis, ke ŝi tamen ne bezonas miri kaj demandi al si. Ŝi tamen de la unua momento sciis, kiu ploras apud ŝi.

”Kara,” ŝi flustris, ”kial vi ne montras vin al mi, kiel vi faris antaŭhieraŭ? Vi ja tamen scias, ke mi volonte faros ĉion, kion mi povos, por forviŝi viajn larmojn.”

Ŝi aŭskultis por respondo, sed respondo ne venis. Ŝi nur aŭdis, kiel la mortintino plorĝemetas apud ŝi.

Elseto provis aŭskulti al tio, kion la pastro diris sur sia katedro, sed ŝi malmulte povis sekvi tion, kion li diris. Kaj ŝi fariĝis malpacienca kaj flustris: "Mi konas iun, kiu havas pli gravajn motivojn ol iu alia por plori, kaj tio estas mi mem. Se mia nutrofratino ne estus sciiginta al mi, kiuj estas ŝiaj murdintoj, tiam mi povus sidi tie ĉi kun la koro plena de ĝojo."

Dum ŝi aŭskultis al la plorado, ŝi incitiĝis pli kaj pli, kaj ŝi pensis: "Kiel mia mortinta nutro fratino povas postuli de mi, ke mi perfidu tiun, kiun mi amas? Neniam ŝi estus konsentinta fari tian agon, se ŝi ankoraŭ estus vivanta."

Ŝi sidis en la preĝeja benko, sed ŝi apenaŭ povis teni sin trankvila. Ŝi balancis la korpon tien kaj reen kaj tordis la manojn. "Nun tio verŝajne sekvos min la tutan tagon," ŝi pensis, "kaj kiu scias, ĉu ĝi ne sekvos min dum la tuta vivo?"

Sed ĉiam pli profundaj kaj pezaj fariĝis la plorĝemetoj, kiujn ŝi aŭdis apud si, kaj fine ŝia koro tamen estis tuŝata, tiel ke ŝi mem komencis plori.

"Tiu, kiu tiel ploras, certe devas havi terure pezan malĝojon," ŝi pensis. "Tiu certe portas suferon pli pezan ol iu vivanto povas kompreni."

Kiam la diservo estis finita kaj Elseto venis el la preĝejo, ŝi ne aŭdis plu tiun plorĝemadon. Sed dum la tuta vojo hejmen ŝi mem iris plorante pro tio, ke ŝia nutrofratino ne povas trovi ripozon en sia tombo.

Kiam ree estis diservo en la vespero, Elseto denove iris al la preĝejo, ĉar ŝi volis scii, ĉu ŝia nutrofratino ankoraŭ sidas tie plorante.

Kaj tuj kiam Elseto eniris la preĝejon, ŝi aŭdis ŝin, kaj ŝia

animo tremis en ŝi, kiam sonis la plorĝemetoj. Ŝi sentis, ke ŝia forto malaperas, kaj ŝi havis volon nur por helpi la mortintinon, kiu senpace iras inter la homoj.

Kiam Elseto venis el la preĝejo, ankoraŭ estis tiel hele, ke ŝi povis vidi, ke unu el tiuj, kiuj iras antaŭ ŝi, faras sangajn piedspurojn sur la neĝo.

”Kiu povas esti tiel malriĉa, ke li iras per nudaj piedoj kaj faras sangajn piedspurojn sur la neĝo?” ŝi pensis.

Ĉiuj, kiuj iris antaŭ ŝi, ŝajnis esti homoj en bona stato. Ĉiuj estis bone vestitaj kaj havis ŝuojn sur la piedoj.

Sed la ruĝaj piedspuroj ne estis malnovaj. Elseto vidis, kiel ili estas farataj en la neĝo de iu, kiu iras antaŭ ŝi.

Estas iu, kiu difektis siajn piedojn sur longaj vojoj,” ŝi pensis. ”Dio faru, ke li ne bezonu iri longe, antaŭ ol li venos sub tegmenton kaj trovos ripozon!”

Ŝi tre volis scii, kiu faris tian pezan iron, kaj ŝi sekvis la spurojn, kvankam ŝi tiam devis foriri de sia propra vojo.

Sed subite ŝi rimarkis, ke ĉiuj preĝejvizitintoj flankeniris al alia direkto, kaj ke ŝi estas sola sur la strato. Tamen la ruĝaj piedspuroj daŭre desegniĝis antaŭ ŝi.

”Estas mia kompatinda nutrofratino, kiu iras tie,” ŝi tiam pensis, kaj ŝi sciis, ke ŝi la tutan tempon subsentis, ke estas ŝi.

”Ho, mia kompatinda nutrofratino, mi kredis, ke vi tiel facile iras trans la teron, ke via piedo ne tuŝas la grundon. Sed certe neniu vivanto povas kompreni, kiel turmenta via iro estas al vi.”

Larmoj ekvenis en ŝiajn okulojn, kaj suspire ŝi diris: ”Ke ŝi tamen ne povas trovi ripozon en sia tombo! Ve al mi, ĉar ŝi devis vagi tie ĉi tiel longe, ke sango fluas el ŝiaj piedoj!”

”Haltu, mia kara nutrofratino!” ŝi vokis. ”Haltu, por ke mi povu paroli kun vi!”

Sed kiam ŝi kriis tion, ŝi vidis, ke la piedspuroj ankoraŭ pli rapide metas sin sur la neĝon, kvazaŭ la mortintino plirapidigus siajn paŝojn.

”Nun ŝi forkuras de mi. Ŝi ne plu atendas helpon de mi,” Elseto diris.

La sangaj piedspuroj tute malekvilibrigis ŝin, kaj ŝi elvokis: ”Mia kara nutrofratino! Mi faros ĉion, kion vi volas, por ke vi trovu trankvilon en via tombo.”

Baldaŭ post kiam Elseto diris tiujn vortojn, venis al ŝi altkreska virino, kiu estis postirinta ŝin, kaj metis sian manon sur ŝian brakon.

”Kiu estas vi, kiu iras tie ĉi sur la strato kaj ploras kaj tor-das la manojn?” la virino diris. ”Vi similas al malgranda fraŭlino, kiu venis al mi lastvendrede kaj petis pri ofico kaj poste ne revenis al mi. Aŭ ĉu vi estas ŝi?”

”Ne, mi ne estas tiu,” Elseto diris, ”sed se estas tiel, kiel mi kredas, ke vi estas la mastrino en la gastejo de la urbodomo, tiam mi scias, pri kiu fraŭlino vi parolas.”

”Tiam vi diru al mi, kial ŝi foriris de mi kaj ne revenis,” la mastrino diris.

”Ŝi foriris de vi,” Elseto diris, ”ĉar ŝi ne volis aŭdi la parolojn de ĉiuj malbonfarantoj, kiuj sidis en via trinkejo.”

”Multaj sovaĝaj viroj sidas en mia trinkejo, sed malbonfarantoj ne sidas tie,” la mastrino diris.

”Tamen la fraŭlino aŭdis, kiam tri viroj sidis tie kaj parolis unu kun la alia,” Elseto diris, ”kaj unu el ili diris: ’Trinku, mia frato! Ankoraŭ daŭras la mono de sinjoro Arne!’ ”

Dirinte tion Elseto pensis: ”Nun mi helpis mian nutrofra-

tinon kaj diris, kion mi aŭdis. Nun Dio helpu min, tiel ke la mastrino ne kredu miajn vortojn, kaj mi ne havos kulpon.”

Sed kiam ŝi el la mieno de la mastrino komprenis, ke tiu kredas ŝin, ŝi ektimis kaj volis forkuri. Sed antaŭ ol ŝi trovis tempon por fari eĉ unu paŝon, la peza mano de la mastrino firme ekprenis ŝin, tiel ke ŝi ne povis forkuri.

”Se vi aŭdis, ke tiaj vortoj estis dirataj en mia trinkejo, fraŭlino,” la mastrino diris, ”tiam vi ne povas forkuri. Sed vi devas akompani min al tiuj, kiuj havas potencon kaj volon por kapti la murdintojn kaj havigi al ili ilian punon.”

La forkuro de sir Archie

Elseto venis en la gastejan salonon, envolvita en sia longa mantelo, kaj iris al tablo, kie sir Archie sidis trinkante kun siaj amikoj. Multe da gastoj sidis ĉe la tabloj en la gastejo, sed Elseto ne atentis pri ĉiuj miraj rigardoj, kiuj sekvis ŝin, kiam ŝi iris kaj eksidis ĉe la flanko de tiu, kiun ŝi amis. Ŝi pensis nur, ke ŝi volas kunesti kun sir Archie dum la lastaj momentoj, kiam li estas libera.

Kiam sir Archie vidis Elseton veni por preni lokon apud li, li levis sin kaj eksidis kun ŝi ĉe tablo, kiu staris malproksime en la salono, iel kaŝita malantaŭ kolono. Ŝi povis vidi, ke li ne ŝatas, ke ŝi venas al li en gasteja trinkejo, kien junaj fraŭlinoj ordinare ne eniras.

”Mi ne bezonas paroli multajn vortojn kun vi, sir Archie,” Elseto diris, ”sed vi tamen devas ekscii, ke mi ne povas akompani vin al via lando.”

Kiam sir Archie aŭdis Elseton diri tion, teruro kaptis lin, ĉar li timis, ke la malbonaj pensoj ree ekregos lin, se li perdos Elseton.

”Kial vi ne volas akompani min, Elseto?” sir Archie diris.

Elseto sidis pala kiel mortinto. Ŝiaj pensoj estis tiel konfuzitaj, ke ŝi apenaŭ sciis, kion ŝi respondas al li.

”Ne povas esti bone akompani dungosoldaton,” ŝi diris. ”Neniu scias, ĉu tia homo restos fidela al sia promeso.”

Antaŭ ol sir Archie trovis tempon por respondi, maristo venis en la gastejon.

Li iris al sir Archie kaj diris al li, ke li estas sendita de la estro sur la granda galeaso, kiu kuŝas frostfiksita malantaŭ Trifoliinsulo. Nun la ŝipestro petis, ke sir Archie kaj ĉiuj liaj viroj tiun ĉi vesperon pretigu sian pakaĵon kaj venu sur la ŝipon. La ŝtormo ree komenciĝis, kaj la maro komencis liberiĝi de glacio malproksime en la okcidento. Povus esti, ke oni antaŭ la tagiĝo havus liberan vojon al Skotlando.

"Vi aŭdas, kion li diras," sir Archie diris al Elseto. "Ĉu vi volas akompani min?" "Ne," Elseto diris, "mi ne volas akompani vin."

Sed interne ŝi tre ekĝojis, ĉar ŝi pensis: "Nun tamen povos okazi tiel, ke li foriros de tie ĉi, antaŭ ol la gardistaro trovos tempon por kapti lin."

Sir Archie ekstaris kaj iris al sir Filip kaj sir Reginald kaj rakontis la sciigon. "Iru antaŭ mi al la loĝejo," li diris, "kaj ordigu ĉion. Mi ankoraŭ devas paroli kelkajn vortojn kun Elseto."

Kiam Elseto vidis, ke sir Archie revenas al ŝi, ŝi forige manĝestis, kvazaŭ por igi lin foriri.

"Kial vi revenas, sir Archie?" ŝi diris. "Kial vi ne rapidas al la maro tiel rapide, kiel viaj piedoj povas porti vin?"

Ĉar ŝia amo al sir Archie estis tiel granda. Vere ŝi perfidis lin pro sia kara nutrofratino, tamen ŝi deziris pli ol ion alian, ke li povu forkuri.

"Ne, mi volas unue peti vin ankoraŭ unu fojon, ke vi venu kun mi," sir Archie diris.

"Vi ja tamen scias, sir Archie, ke mi ne povas akompani vin," Elseto diris.

”Kial vi ne povas?” sir Archie diris. ”Vi estas tiel sola kaj malriĉa knabino kaj neniu priatentas, kio okazos al vi. Sed se vi venos kun mi, mi faros vin potenca sinjorino. Mi estas al-tranga viro en mia propra lando. Vi iros vestita per silko kaj oro, kaj vi dancos ĉe la kortego de la reĝo.”

Elseto timtremis pro tio, ke li restas ĉe ŝi, kiam ankoraŭ estas eble al li forkuri. Apenaŭ ŝi trovis trankvilon respondi lin: ”Vi nun foriru, sir Archie! Vi ne restu pli longe por peti min.”

”Mi volas diri ion al vi, Elseto,” sir Archie diris kaj parolis al ŝi per pli kaj pli mola voĉo. ”Kiam mi unue vidis vin, mi pensis nur, ke mi logu kaj kaptu vin. Mi unue promesis al vi kastelon kaj oron nur ŝerce, sed de la antaŭhieraŭa vespero mi havas honestan intencon por vi. Kaj nun estas mia volo kaj intenco fari vin mia edzino. Vi povas fidi al mi, je mia honoro kiel nobelo kaj soldato.”

En la sama momento Elseto aŭdis, ke armitaj homoj paŝas sur la placo antaŭ la gastejo. ”Se mi nun akompanas lin,” ŝi pensis, ”tiam li povas sin savi. Mi tiras lin en pereon, se mi neas. Estas pro mi, ke li restas sidanta tie ĉi tiel longe, ke la gardistaro povos kapti lin. Sed mi tamen ne povas akompani tiun, kiu murdis ĉiujn miajn.”

”Sir Archie,” Elseto diris, esperante ke ŝi povos timigi lin. ”Ĉu vi ne aŭdas, ke armitaj homoj paŝas trans la placon?”

”Jes, mi aŭdas,” sir Archie diris, ”verŝajne estis batalo en iu trinkejo. Vi ne estu maltrankvila, Elseto! Estas nur iuj fiŝistoj, kiuj komencis disputi pri vetero kaj vento.”

”Sir Archie,” Elseto diris, ”ĉu vi ne aŭdas, ke ili haltas antaŭ la urbodomo?”

Elseto tremis en la tuta korpo, sed sir Archie ne rimarkis tion, sed estis tute trankvila.

”Diru, kie ili alie haltu?” sir Archie diris. ”Ili ja devas konduki la malpacigantojn tien ĉi por meti ilin en la arestejon de la urbodomo. Ne aŭskultu al tio, Elseto, sed aŭskultu al mi, kiu petas vin akompani min trans la maron!”

Sed Elseto ankoraŭfoje provis timigi lin.

”Sir Archie,” ŝi diris, ”ĉu vi ne aŭdas, ke la soldatoj venas malsupren sur la gasteja ŝtuparo de la urbodomo?”

”Jes, mi aŭdas,” sir Archie diris, ”certe ili venas por malpleniĝi kruĉon da biero, post kiam ili metis siajn kaptitojn en sekuran lokon. Ne pensu pri ili, Elseto, sed pensu pri tio, ke morgaŭ vi kaj mi sur la libera maro veturos al mia patrolando!”

Sed Elseto estis pala kiel mortinto, kaj ŝi tiel tremis, ke ŝi apenaŭ povis paroli.

”Sir Archie,” ŝi diris, ”ĉu vi ne vidas, kiel ili parolas kun la mastrino tie ĉe la servotablo? Certe ili demandas al ŝi, ĉu iu el tiuj, kiujn ili serĉas, troviĝas tie ĉi.”

”Verŝajne ili parolas kun ŝi, ke ŝi miksu al ili iun fortan kaj varmigan trinkaĵon en tiu ĉi ŝtorma nokto,” sir Archie diris. ”Vi ne tremu tiel, Elseto. Vi povas akompani min sen timo. Mi diras al mi, ke se mia patro nun volus edzigi min al la plej nobla fraŭlino en nia lando, mi rifuzus. Veturu kun mi trans la maron sen timo, Elseto! Vi vojaĝu kun la plej granda feliĉo kaj ĝojo.”

Pli kaj pli da soldatoj kolektiĝis ĉe la pordo, kaj Elseto ne povis plu elteni pro timpremo. ”Mi ne povas elteni tion, ke ili venos kaj kaptos lin,” ŝi pensis. Ŝi klinis sin al sir Archie kaj flustris al li:

”Ĉu vi ne aŭdas, sir Archie, ke la soldatoj demandas la mastrinon, ĉu la murdintoj de sinjoro Arne estas tie ĉi en la salono?”

Tiam sir Archie ĵetis rigardon internen en la ĉambron kaj rigardis la soldatojn, kiuj parolis kun la mastrino. Sed li ne ekstaris por forkuri, kiel atendis Elseto, sed li klinis sin profunde kaj rigardis en la okulojn de Elseto. ”Ĉu estas vi, Elseto, kiu rekonis kaj perfidis min?” li demandis.

”Mi faris tion pro mia kara nutrofratino, por ke ŝi trovu pacon en sia tombo,” Elseto diris. ”Dio scias, kiel suferige estis al mi fari tion. Sed nun forkuru, sir Archie! Ankoraŭ estas tempo. Ili ankoraŭ ne baris ĉiujn pordojn kaj vestiblojn.”

”Vi lupido!” sir Archie diris. ”Kiam mi unue vidis vin sur la varfoj, mi pensis, ke mi devas mortigi vin.”

Sed Elseto metis sian manon sur lian brakon.

”Forkuru, sir Archie! Mi ne povas sidi trankvile kaj vidi, ke ili venas kaj kaptas vin. Se vi ne volas forkuri sen mi, mi en la nomo de Dio akompanos vin. Sed ne restu plu tie ĉi pro mi, sir Archie! Ĉion, kion vi volas, mi faros por vi, se vi nur savos vian vivon.”

Sed sir Archie estis tre kolera, kaj li parolis moke al Elseto.

”Nun, fraŭlino, vi neniam iros en orbroditaj ŝuoj tra grandaj kastelaj salonoj. Nun vi dum via tuta vivo restos tie ĉi en Marstrand kaj senintestigos fiŝojn. Neniam vi ricevos edzon, kiu havas kastelon kaj feŭdon, Elseto. Via edzo estos malriĉa fiŝisto, kaj via domo estos kabano sur nuda insuleto.”

”Ĉu vi ne aŭdas, ke ili postenigas gardistojn ĉe ĉiuj pordoj kaj mallevas lancojn antaŭ la enirejoj?” Elseto demandis.

”Kial vi ne rapidas de tie ĉi? Kial vi ne forkuras sur la glacion, kaj kaŝas vin sur iu ŝipo?”

”Mi ne forkuras, ĉar mi ŝatas sidi kaj paroli kun Elseto,” sir Archie diris. ”Ĉu vi pripensas, ke nun ĉiu ĝojo finiĝis por vi, Elseto? Ĉu vi pripensas, ke mi nun ne povas esperi plu malculpigi mian krimon?”

”Sir Archie,” flustris Elseto kaj time levis sin, ”nun la soldatoj estas pretaj. Nun ili venas por kapti vin. Vi rapide forkuru! Mi venos al vi sur la ŝipon, se vi nur forkuros.”

”Vi ne bezonas timi, Elseto,” sir Archie diris.

”Ni ankoraŭ havas iom da tempo por interparoli. La soldatoj ne intencas ĵeti sin sur min tie ĉi, kie mi povas defendi min. Ili intencas kapti min en la mallarĝa gastejŝtuparo. Tie ili intencas trapiki min per siaj longaj lancoj. Estas ja tio, kion vi ĉiam deziris al mi, Elseto.”

Sed ju pli timigita montris sin Elseto, des pli trankvila fariĝis sir Archie. Ŝi ankoraŭ petis, ke li forkuru, sed li ridis al ŝi.

”Vi ne estu certa pri tio, fraŭlino, ke la soldatoj povos kapti min. Mi estis en pli grandaj danĝeroj ol tiu ĉi, kaj savis min. Estis pli malbone por mi antaŭ kelkaj monatoj en Svedlando. Estis kelkaj kalumniantoj, kiuj diris al la reĝo Johano, ke lia skota regimento ne estas fidela al li. Kaj la reĝo kredis al ili. Li enfermigis la tri gvidantojn en la turo, kaj iliajn soldatojn li sendis el sia lando kaj gardigis ilin, ĝis ili estis sur la alia flanko de la limo.”

”Forkuru, sir Archie, forkuru!” Elseto petis.

”Vi ne estu maltrankvila pro mi, Elseto,” sir Archie diris kaj ridis krude. ”Hodiaŭ vespere mi ree similas al mi mem, nun mi ree havas mian malnovan humoron. Nun mi ne vidas plu la junan fraŭlinon antaŭ miaj okuloj. Do mi certe

trapasos la malfacilaĵojn. Mi rakontos al vi pri la tri viroj, kiuj sidis en la malliberejo de reĝo Johano. Iun nokton, kiam la gardistoj estis ebriaj, ili ŝteliris el la turo kaj forkuris. Poste ili kuris al la limo. Sed tiel longe, ke ili iris en la lando de la sveda reĝo, ili ne kuraĝis malkaŝi, kiuj ili estas. Kiam ili ne povis trovi alian eliron, Elseto, ili havigis al si vestojn el vila felo kaj diris, ke ili estas tanistaj submajstroj, kiuj iras tra la lando por serĉi laboron.”

Nun Elseto komencis rimarki, kiel sir Archie ŝanĝiĝis rilate al ŝi. Kaj ŝi komprenis, ke li malamas ŝin, de kiam li eksciis, ke ŝi malkaŝis lin.

”Ne diru tiel, sir Archie!” Elseto diris.

”Kial vi perfidis min, kiam mi plej bone kredis vin?” sir Archie diris. ”Nun mi ree estas tia, kia mi antaŭe estis. Nun mi konsideras la vivon de neniŭ. Kaj nun vi vidis, ke ree ĉio sukcesos al mi, kiel pli frue. Ĉu ni ne estis en malbona situacio, mi kaj miaj kamaradoj, kiam ni fine estis trairintaj Svedlandon kaj venis tien ĉi al la bordo? Ni ne havis monon por aĉeti al ni decajn vestojn. Ni ne havis monon por havigi al ni transveturon al Skotlando. Ni ne povis trovi alian eliron ol perforte atingi rimedon en la pastrodomo de Solberga.”

”Ne plu parolu pri tio!” Elseto diris.

”Tamen jes, nun vi aŭdos ĉion.” sir Archie diris. ”Estas afero, kiun vi ne konas, nome ke unue, kiam ni venis en la pastrodomon, ni iris al sinjoro Arne, vekis lin kaj diris al li, ke li donu al ni monon. Se li farus tion, ni farus neniun malbonon al li. Sed sinjoro Arne ekbatalis kontraŭ ni, kaj tiam ni devis mortigi lin. Kaj mortiginte lin ni devis mortigi ĉiujn liajn domanojn.” Elseto ne interrompis lin plu, sed fariĝis senenhava kaj malvarme en ŝia koro. Ŝi frostotremis, kiam ŝi vidis kaj

aŭdis lin, ĉar kiam li parolis, li ekhavis kruelan kaj sangosofan aspekton. "Kion mi volis fari?" ŝi pensis. "Ĉu mi estis freneza amante tiun, kiu murdis ĉiujn miajn? Dio pardonu al mi mian pekon!"

"Kiam ni kredis, ke ĉiuj estas mortintaj," sir Archie diris, "ni eltrenis la pezan monkeston el la domo. Poste ni faris fajron ĉirkaŭ ĝi, por ke ĉiuj homoj kredu, ke sinjoro Arne brulmortis."

"Mi estas aminta lupon el la arbaro," Elseto diris al si mem. "Kaj lin mi volis savi de puno!"

"Sed ni veturis sur la glacieron kaj fuĝis eksteren al la maro," sir Archie daŭrigis. "Ni ne timis tiel longe, ke ni vidis la fajron flami al la ĉielo, sed kiam ni vidis ĝin malfortiĝi, ni ektimis. Ni komprenis, ke homoj alvenis, kiuj estingis la fajron, kaj ke oni persekutos nin. Tiam ni reveturis al la bordo, kie ni estis vidintaj riveran elfluon kun malforta glacio. Ni levis la monkeston de la sledo kaj veturis antaŭen, ĝis la glacio rompiĝis sub la ĉevalo. Tiam ni lasis ĝis droni kaj mem kuris flanken. Se vi estus io alia ol fraŭlino, Elseto, vi komprenus, ke tio estis brave kaj rapide farita afero. Ni kondukis, kiel decas al viroj."

Nun Elseto sidis trankvila. Ŝi sentis brulvundan doloron en sia koro. Sed sir Archie malamis ŝin kaj ĝojis turmentante ŝin. "Poste ni prenis niajn zonojn, fiksas ilin al la kesto kaj komencis tiri. Sed kiam la kesto faris postsignojn en la glacio, ni iris sur la bordon, debranĉis piceon kaj metis branĉojn sub la keston. Poste ni deprenis niajn ŝuojn kaj foriris trans la glacieron sen lasi spurojn malantaŭ ni."

Sir Archie haltis por ĵeti mokan rigardon al Elseto.

"Kvankam ĉio tio bone sukcesis al ni, ni tamen estis en

malbona situacio. Kien ajn ni venus en niaj sangomakulitaj vestoj, oni rekonus kaj kaptus nin. Sed jen aŭskultu, Elseto, por ke vi povu diri tion al ĉiuj, kiuj volas klopodi persekuti nin, por ke ili komprenu, ke ni ne estas facile kapteblaj. Aŭdu, kiam ni venis irante sur la glacio al Marstrand, ni renkontis niajn samlandanojn kaj kamaradojn, kiujn la reĝo Johano sendis el sia lando. Ili ne estis povintaj forlasi Marstrand pro la glacio, kaj ili helpis nin en nia mizero, donante vestojn al ni. De tiam ni sendanĝere ĉirkaŭiris tie ĉi en Marstrand. Kaj neniŭ danĝero nun minacus nin, se vi ne estus malfidele perfidinta min.”

Elseto sidis senmova. Estis tro granda malĝojo por ŝi. Ŝi apenaŭ povis senti sian koron bati.

Sed sir Archie salte ekstaris kaj kriis:

”Kaj ankaŭ neniŭ malbono okazos al ni en tiu ĉi vespero. Tion vi mem vidis, Elseto.”

En la sama momento li ekprenis Elseton per ambaŭ siaj manoj kaj levis ŝin. Kaj kun Elseto kiel ŝildo antaŭ si sir Archie kuris tra la gasteja salono al la elirejo. Kaj la soldatoj, kiuj postene gardis ĉe la pordo, etendis siajn longajn lancojn al li, sed ili ne kuraĝis uzi ilin, timante ke ili vundos Elseton.

Kiam sir Archie venis sur la mallarĝan ŝtuparon kaj en la vestiblon, li etendis antaŭ si Elseton en la sama maniero. Kaj ŝi pli bone ŝirmis lin ol la plej bona kiraso, ĉar la soldatoj, kiuj staris tie, ne povis uzi siajn armilojn. Tiamaniere li kuris grandan parton de la ŝtuparo, kaj Elseto sentis la liberajn ventojn de la ĉielo blovi kontraŭ ilin.

Sed Elseto ne plu sentis amon al sir Archie, sed ĝismortan malamon, kaj ŝi pensis nur pri tio, ke li estas malbona murdinto. Kaj kiam ŝi nun vidis, ke ŝi ŝirmas lin per sia korpo, tiel

ke li preskaŭ povas savi sin, ŝi etendis sian manon kaj tiris al si unu el la lancoj tenataj de la soldatoj kaj direktis ĝin kontraŭ sian koron. "Nun mi volas tiel servi al mia nutrofratino, ke tiu komisio baldaŭ estos plenumita," Elseto pensis. Kaj je la posta paŝo, kiun sir Archie faris supren sur la ŝtuparo, la lanco penetris en la koron de Elseto.

Sed tiam sir Archie jam staris plej supre sur la ŝtuparo. Kaj la soldatoj retiris sin, kiam ili vidis, ke unu el ili vundis la fraŭlinon. Kaj li preterkuris ilin.

Kiam sir Archie venis sur la placon, li aŭdis soldataran krion el iu strateto kaj vokokriojn en skota lingvo: "Al helpo! Al helpo! Por Skotlando! Por Skotlando!"

Estis sir Filip kaj sir Reginald, kiuj estis kolektintaj la skotojn kaj nun venis por helpi lin. Kaj sir Archie kuris kontraŭ ilin kaj kriis per laŭta voĉo: "Tien ĉi! Tien ĉi! Por Skotlando! Por Skotlando!"

Trans la glacieron

Kiam sir Archie iris for trans la glacieron, li ankoraŭ portis Elseton sur sia brako.

Sir Filip kaj sir Reginald iris apud li. Ili volis rakonti al li, kiel ili eksciis pri la embusko, kaj kiel ili sukcesis veturigi la pezan monkeston al la galeaso kaj kolekti la samlandanojn, sed sir Archie ne aŭskultis al ili. Li ŝajnis interparoli kun tiu, kiun li portis sur sia brako.

”Kiun vi kunportas kun vi?” sir Reginald demandis.

”Estas Elseto,” sir Archie respondis. ”Mi kunprenos ŝin al Skotlando. Mi ne volas postlasi ŝin tie ĉi. Tie ĉi ŝi ne fariĝus io alia ol malriĉa fiŝlaboristino.”

”Jes, tio ŝajnas kredinda,” sir Reginald diris.

”Tie ĉi oni donus al ŝi vestojn nur el kruda lano,” sir Archie diris, ”kaj ŝi dormus en mallarĝa kuŝejo el malmolaj tabuloj. Sed mi pretigos al ŝi kuŝejon el la plej molaj kusenoj, kaj ŝian ripozejon mi farigos el marmoro. Mi volvos ĉirkaŭ ŝin la plej multekostajn felojn, kaj sur ŝiajn piedojn mi metigos ŝuojn kun juvelaj bukoj.”

”Vi intencas al ŝi grandan honoron,” sir Reginald diris.

”Mi ne povas lasi ŝin resti tie ĉi hejme,” sir Archie diris, ”ĉar kiu tiam donus al si tempon memori pri tia malriĉa kompatindulino? Post nur kelkaj monatoj ĉiuj forgesus ŝin. Neniu venus al ŝia loĝejo, neniu vizitus ŝin en ŝia soleco. Sed kiam mi iam atingos mian hejmon, mi tie konstruigos belan

loĝejon. Tie ŝia nomo staros enĉizita en malmola ŝtono, por ke neniu forgesu ĝin. Tie mi mem iros al ŝi ĉiun tagon, kaj tie ĉio estos tiel bele aranĝita, ke homoj venos vojaĝante de malproksime por viziti ŝin. Tie kandeloj kaj lampoj brulos tage kaj nokte, kaj tie sonos kantado kaj muziko, kvazaŭ tie estus senfina festeno.”

La ŝtormo fortege venis kontraŭ ilin, dum ili iris sur la glacio. Ĝi ŝire malfiksis la mantelon de Elseto kaj flirtigis ĝin kiel flagon.

”Ĉu vi volas helpi min porti Elseton dum momento,” sir Archie diris, ”dum mi volvas ŝian mantelon ĉirkaŭ ŝin?”

Sir Reginald prenis Elseton sur siajn brakojn, sed en la sama momento tia teruro kaptis lin, ke li lasis ŝin gliti el siaj manoj sur la glacian. ”Mi ne sciis, ke Elseto mortis!” li diris.

La muĝo de la ondoj

La tutan nokton la ŝipestro sur la granda galeaso iris tien kaj reen sur la alta ferdeko super la ŝipanara kajuto. Estis mallume, kaj la ŝtormo siblis ĉirkaŭ li. Ĝi venis kunportante jen neĝon jen pluvon. Ankoraŭ la glacio kuŝis firma kaj portoforta ĉirkaŭ la galeaso, tiel ke la ŝipestro same bone povus trankvile dormi en sia kajuto. Sed li estis surpiede la tutan nokton. Jen kaj jen li metis la manon al la orelo kaj aŭskultis.

Ne estis facile scii, pro kio li atende aŭskultis. Ĉiuj liaj homoj estis surŝipe kaj same ĉiuj vojaĝantoj, kiujn li veturigis al Skotlando. Ili nun ĉiuj kuŝis dormante en la ŝipĉambroj. Neniuj el ili havis iun interparolon, al kiu la ŝipestro povis aŭskulti.

Kiam la ŝtormo preterflugis la frostfiksitan galeason, ĝi kvazaŭ laŭ malnova kutimo ĵetis sin al la galeaso por peli ĝin antaŭ si trans la maron. Kaj kiam la galeaso ĉiam kuŝis senmova, la ŝtormo fojon post fojo ekskuis ĝin. Tintadis ĉiuj malgrandaj glacipecoj kiuj pendis en la ŝnuregaro. Knaris kaj krakis en la flankoj de la ŝipo. Fortaj klakoj sonis en la mastoj, kiuj estis premataj tiel, ke ili preskaŭ rompiĝis.

Ne estis silenta nokto. Oni aŭdis kvazaŭ malfortan grincondon en la aero, kiam la neĝo siblante alblovis. Kraketado kaj plaŭdado aŭdiĝis, kiam la pluvo estis vipata malsupren.

Sed en la glacio estiĝis unu fendo post la alia, kaj tiam aŭ-

diĝis tondro, kvazaŭ militŝipoj kuŝus sur la maro kaj deŝargus fortajn pafojn unu kontraŭ la alian.

Sed la ŝipestro ne aŭskultis por aŭdi ion el tio. Li iris sur la ferdeko la tutan nokton, ĝis griza taglumo disvastiĝis sur la ĉielo, sed li tamen ne aŭdis tion, kion li volis aŭdi.

Fine sonis tra la nokto kanteca unutona muĝo, lulanta kaj karesanta sono kiel de malproksima kanto.

Tiam la ŝipestro rapidis trans la remistajn benkojn en la mezo de la galeaso al la alta konstruaĵo en la pruo, kie dormis liaj viroj. "Leviĝu!" li vokis al ili, "kaj prenu boatstangojn kaj remilojn! Baldaŭ venos la momento, kiam ni liberiĝos. Mi aŭdas la muĝon de la senlacacia akvo. Mi aŭdas la kanton de la liberaj ondoj." La viroj tuj levis sin el sia dormo. Ili postene staris laŭ la flankoj de la ŝipo, dum la mateno malrapide heliĝis.

Kiam fine tiom heliĝis, ke ili povis vidi tion, kio okazis dum la nokto, ili trovis, ke golfoj kaj markoloj estas senlacaciaj ĝis la malproksima maro. Sed en tiu golfo, kie ili estis frostfiksitaĵoj ne estis eĉ unu fendo en la glacio, sed ĝi estis firma kaj nerompita.

Kaj en la akvokolo, kiu kondukis el la golfo turigis sin alta muro de glacio. La ondoj, kiuj libere ludis ekster ĝi, suprenĵetis tien unu glacitavolaĵon post la alia.

Veloj svarmis ekstere en la akvokoloj. Estis ĉiuj fiŝistoj, kiuj estis frostfiksitaĵoj en Marstrand kaj nun forrapidis de tie. La ondoj ĵetis sin alten, kaj glacipecoj ankoraŭ dancis sur la ondoj, sed kredeble ŝajnis al la fiŝistoj, ke ili ne havas tempon atendi trankvilan kaj sendanĝeran maron, sed ili jam komencis sian veturon. Ili staris en la pruo de siaj ŝipetoj kaj akre observis. La malgrandajn glacipecojn ili forigis per remilo,

sed kiam la grandaj venis, ili turnis la direktilojn kaj iris flanken. Sur la galeaso la ŝipestro staris sur la altkonstruita ŝipanara kajuto kaj postrigardis ilin. Li komprenis, ke ili havas malfacilan vojaĝon, sed li ankaŭ vidis, ke unu post la alia iel trapasas kaj atingas la maron.

Kaj kiam la ŝipestro vidis la velojn gliti trans la bluan maron, lia sopiro tiel forte atakis lin, ke larmoj preskaŭ venis en liajn okulojn.

Sed lia ŝipo kuŝis senmova, kaj antaŭ li la glacio turigis sin en pli kaj pli altan muron. Ekstere sur la maro naĝis ne nur ŝipoj kaj ŝipetoj, sed kelkfoje alnaĝis ankaŭ blankaj montetoj el glacio. Estis gigantaj tavoloj, kiuj estis ĵetitaj unu sur la alian kaj nun velis suden. Ili brilis blanke kiel arĝento en la matena suno, kaj kelkfoje ili ekfiamis ruĝe, kvazaŭ rozoj estus sternataj sur ili.

Sed meze en la siblanta ŝtormo aŭdiĝis laŭtaj krioj. Jen sonis kiel kantantaj voĉoj, jen kiel tondro de trombono. Estis forta ĝojego en tiuj sonoj. Ili estis tiaj, ke la koro nepre pli libere batis, kiam ili aŭdiĝis. Ili venis de longa vico da cignoj, kiuj alflugis de sude.

Sed kiam la ŝipestro vidis la glacimontojn naĝi suden kaj la cignojn flugi norden, tia sopiro atakis lin, ke li tordis la manojn.

”Ve al mi, ke mi devas kuŝi tie ĉi!” li diris.

”Kiam la glacio rompiĝos en tiu ĉi golfo? Tie ĉi mi devas kuŝi ankoraŭ multajn tagojn kaj atendi.”

Sed kiam li pensis tion, li ekvidis veturantan homon alveni sur la glacio. Li venis el mallarĝa akvokolo en la direkto al Marstrand, kaj li tute sentime veturis sur la glacio, kvazaŭ li ne scius, ke la ondoj ree komencis porti ŝipojn kaj ŝipetojn.

Kiam li alveturis apud la galeason, li vokis supren al la ŝipestro:

”Kara, ĉu vi havas ion por manĝi, kiam vi kuŝas frostfiksita en la glacio? Ĉu vi volas aĉeti de mi salitan haringon aŭ sekigitan moruon aŭ fumaĵitan angilon?”

La ŝipestro ne penis respondi al li. Li pugnis la manon al li kaj blasfemis.

Tiam la fiŝvendisto malsuprenpaŝis de la ŝarĝo. Li prenis fojnofaskon el la sledo kaj metis antaŭ la ĉevalon. Poste li grimpis sur la ferdekon de la galeaso.

Kiam li staris antaŭ la ŝipestro, li diris al li kun granda seriozo:

”Hodiaŭ mi ne venas tien ĉi por vendi fiŝon. Sed mi scias, ke vi estas pia homo. Tial mi venis al vi por peti vin, ke vi rehavigu al mi fraŭlinon, kiun la skoltaj soldatoj hieraŭ kunprenis tien ĉi al la ŝipo.”

”Mi ne scias, ke ili kondukis iun fraŭlinon tien ĉi,” la ŝipestro diris. ”Neniun virinan voĉon mi aŭdis surŝipe en tiu ĉi nokto.”

”Mi estas Torarin fiŝvendisto,” la alia diris, ”ĉu vi ne audis pri mi? Estis mi, kiu vespermangis kun sinjoro Arne en la sama nokto, kiam li estis murdita. De tiam mi havis la adoptfilinon de sinjoro Arne en mia domo, sed la pasintan nokton liaj murdintoj forrabis ŝin, kaj certe ili kunprenis ŝin tien ĉi al la ŝipo.”

”Ĉu la murdintoj de sinjoro Arne troviĝas sur mia ŝipo?” la ŝipestro diris terurite.

”Vi vidas, ke mi estas malforta kaj senpova homo,” Torarin diris. ”Unu el miaj brakoj estas paralizita, kaj tial mi timas ĵeti min en iun danĝeran entreprenon. Mi dum kelkaj semaj-

noj sciis, kiuj estas la murdintoj de sinjoro Arne, sed mi ne kuraĝis provi venĝi al ili. Sed ĉar mi silentis, ili nun povis forkuri kaj havis okazon kunpreni la fraŭlinon. Kaj nun mi diris, ke mi volas havi nenion pli por penti en tiu ĉi afero. Mi almenaŭ volas provi savi la junan fraŭlinon.”

”Se la murdintoj de sinjoro Arne estas tie ĉi sur la ŝipo, kial la urba gardistaro do ne venas tien ĉi kaj kaptas ilin?”

”Mi petis kaj parolis la tutan nokton kaj matenon,” Torarin diris, ”sed la gardistaro ne kuraĝas iri tien ĉi. Ili diras, ke estas cent dungosoldatoj sur la ŝipo, kaj kun tiuj ili ne kuraĝas eklukti. Tiam mi pensis, ke mi en la nomo de Dio devas veturi sola tien ĉi kaj peti vin, ke vi helpu al mi trovi la fraŭlinon, ĉar mi scias, ke vi estas pia homo.”

Sed la ŝipestro ne respondis al li pri la fraŭlino. Li pensis nur pri la alia diritaĵo. ”Kiel vi povas scii, ke la murdintoj estas tie ĉi surŝipe?” li diris. Torarin montris al granda kesto el kverko, kiu staris inter la remistaj benkoj.

”Mi tro ofte vidis tiun keston en la hejmo de sinjoro Arne por povi erari pri ĝi,” li diris. ”En ĝi kuŝas la mono de sinjoro Arne, kaj kie estas lia mono, tie certe estas ankaŭ liaj murdintoj.”

”Tiu kesto apartenas al sir Archie kaj liaj du amikoj sir Reginald kaj sir Filip,” la ŝipestro diris.

”Jes,” Torarin diris, kaj fikse rigardis la ŝipestron, ”tiel estas. Ĝi apartenas al sir Archie kaj sir Filip kaj sir Reginald.”

Dum momento la ŝipestro staris silenta kaj ĉirkaurigardis al ĉiuj flankoj.

”Kiam vi opinias, ke la glacio foriros tie ĉi en la golfo?” li diris al Torarin.

”Estas strange tie ĉi en tiu ĉi jaro,” Torarin diris. ”En tiu ĉi

golfo la glacio ordinare frue foriras, ĉar estas forta fluo. Sed kiel nun estas, vi devas gardi vin, ke la glacio ne ŝovu vin sur la bordon, kiam ĝi ekmoviĝos.”

”Mi pensas nur pri tio,” la ŝipestro diris.

Ree li staris silenta dum momento. Li turnis la vizaĝon al la maro. La matena suno brilis alte sur la ĉielo, kaj la ondoj reĵetis ĝian brilon. Tien kaj reen veturis la liberaj ŝipoj, kaj kun ĝojkrioj la marbirdoj alflugis elsude. La fiŝoj tenis sin ĉe la akvosurfaco, ili faris altajn saltojn kaj briletante ĵetis sin supren el la akvo, kvazaŭ ĝojofrenezaj post la mallibereco sub la glacio. La mevoj, kiuj estis ĉasintaj ekstere ĉe la glaci-rando, grandare venis al la bordo por ĉasi sur la konataj lokoj.

La ŝipestro ne povis elteni tiun vidon. ”Ĉu mi estas amiko de murdintoj kaj malbonfarantoj?” li diris. ”Ĉu mi fermu miajn okulojn kaj ne vidu, kial Dio tenas la pordojn al la maro fermitaj por mia ŝipo? Ĉu mi pereu pro la maljustuloj, kiuj serĉis rifuĝon tie ĉi?”

Kaj la ŝipestro foriris kaj diris al siaj homoj:

”Mi nun scias, kial ni kuŝas enfermitaj, kiam ĉiuj aliaj ŝipoj iras al la maro. Estas pro tio, ke ni havas murdintojn kaj malbonfarantojn surŝipe.” Post tio la ŝipestro iris al la skotaj dungosoldatoj, kiuj ankoraŭ kuŝis dormante en la ŝipĉambro. ”Karaj,” li diris al ili, ”estu trankvilaj ankoraŭ dum iom da tempo, kiujn ajn kriojn kaj bruon vi aŭdos surŝipe! Ni devas obei la ordonojn de Dio, kaj ne toleri malbonfarantojn internaj. Se vi obeos min, mi promesas, ke mi enmetos al vi tiun keston, kie estas la mono de sinjoro Arne, kaj vi povos dividi ĝin inter vi.”

Sed al Torarin la ŝipestro diris: ”Iru al la sledo kaj ĵetu vian

fiŝon sur la glacieron! Vi nun ricevos alian ŝarĝon por veturigi.” Poste la ŝipestro kaj liaj homoj eniris en la kajuton, kie dormis sir Archie kaj liaj amikoj. Kaj kiam ili ankoraŭ kuŝis en dormo, ili ĵetis sin sur ilin por ligi ilin.

Kaj kiam la tri skotoj provis defendi sin, ili forte batis ilin per hakiloj kaj stangetoj, kaj la ŝipestro diris al ili: ”Vi estas murdintoj kaj malbonfarantoj. Kiel vi povis kredi, ke vi sukcesos eviti vian punon? Ĉu vi ne scias, ke pro vi Dio tenas fermitaj la pordojn al la maro?”

Tiam la tri viroj laŭte vokis siajn kamaradojn, ke ili venu kaj helpu ilin.

”Vi ne voku al ili,” la ŝipestro diris. ”Ili ne venos. Ili ricevis la monon de sinjoro Arne por dividi, kaj ili nun mezuras arĝentan monon per siaj ĉapeloj. Pro tiu mono tiu malbona ago okazis, kaj pro tiu mono la puno nun venos al vi.”

Sed antaŭ ol Torarin trovis tempon ĵeti la fiŝon el la sledo, la ŝipestro kaj liaj viroj venis malsupren al li sur la glacieron. Ili kondukis inter si tri virojn, kiuj estis bone ligitaj. Ili estis kompatinde batitaj kaj estis elĉerpitaj pro siaj vundoj.

”Dio ne vane vokis min,” la ŝipestro diris. ”Kiam mi komprenis lian volon, mi tuj obeis al ĝi.”

Ili kuŝigis la kaptitojn sur la sledon de Torarin, kaj tra mallarĝaj golfoj kaj akvokoloj, kie la glacio ankoraŭ kuŝis firme, Torarin veturigis ilin al Marstrand. Sed dum la posttagmezo la ŝipestro staris sur la alta ŝipanara kajuto de sia ŝipo kaj rigardis al la maro. Ĉio ankoraŭ estis tute sama ĉirkaŭ la ŝipo, kaj la glacimuro antaŭ ĝi daŭre turigis sin pli kaj pli alten.

Tiam la ŝipestro vidis, ke longa vico da homoj venas al lia ŝipo. Estis ĉiuj virinoj en Marstrand, junaj kaj maljunaj. Ili

ĉiuj portis funebrajn vestojn, kaj ili kondukis kun si junajn knabojn, kiuj portis portliton.

Kiam ili venis al la galeaso, ili diris al la ŝipestro.

”Ni venis tien ĉi por reporti junan fraŭlinon, kiu estas mortinta. Tiuj murdintoj konfesis, ke ŝi donis sian vivon, por ke ili ne povu savi sin, kaj nun ni, ĉiuj virinoj en Marstrand, venis por reporti ŝin al nia urbo kun ĉiu honoro, kiun ŝi meritas.”

Tiam oni trovis Elseton kaj portis ŝin sur la glacieron kaj al Marstrand, kaj ĉiuj virinoj en la urbo ploris pro la juna fraŭlino, kiu amis malbonfarulon kaj donis sian vivon por pereigi tiun, kiun ŝi amis.

Sed laŭ la antaŭeniĝo de la virinoj ŝtormo kaj ondoj venis post ili kaj rompis la glacieron, kie ili ĵus iris, tiel ke ĉiuj pordoj al la maro estis malfermitaj, kiam ili venis al Marstrand kun Elseto.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-053-8